

BULGARA

ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO



En la numero:

ESPERANTO KAJ
KOMPUTILOJ



MONDA JARDEKO
POR SPIRITA
RENEŠANCO



JARO DE
GRABOWSKI



FORUMO DE MEM



ALTA DISTINGO
POR „BE“




HEKTOR HODLER
— LA FONDINTO



ORIGINALA
VERKARO



NI RECENZAS



JARO 57 • N-RO 7-8 • JULIO - AŬGUSTO • 88

ESPERANTO KAJ KOMPUTILOJ

ENORMAJ SANCOJ POR LA ESPERANTA LINGVISTIKO


Fine de la Jubilea Jaro de Esperanto, tute novaj perspektivoj por la lingvo estas malfermigantaj. En esperantlingva gazetara konferenco la 25-an de januaro, ĉe la esploro de BSO en Utreĥto, Nederlando, DLT-gvidanto Toon Witkam prezentis simplan mesaĝon: La aŭtomata traduk-sistemo bazita sur Esperanto atingis jam ĉeffrontan lokon en la internacia konkurado.

La legantoj de *Esperanto* memoros, ke ni jam plurfoje traktis la evoluon de la t. n. Distribuita Lingvotradukado-sistemo ekde ĝia naskiĝo en 1982. De la ideo, ke Esperanto povus funkcii kiel komputila interlingvo por la multlingva tradukado de informoj, tra pionira studo de Witkam, ekfunkcio de esplor- kaj evoluig-projekto ĉe lia firmao BSO kun buĝeto de 18 milionoj da guldenoj, kaj ellaboro de la unuaj rezultoj, tiu evoluo estis konsterne rapida kaj —kiel naturas en ĉelima esplorado — tute neantaŭvidebla. La plej frapan rezulton ni raportis en majo pasintjare, nome ke la unuaj du jaroj da eksperimentado lokis Esperanton pli kaj pli firme ĉe la kernon de la sistemo, ĝis tute neanticipita grado (vd. *Esperanto* 1987/p. 84).

Niaj novaĵoj ĉi-foje estas eĉ pli atentofrapaj. En decembro 1987 venis plena testo de la prototipa sistemo, kiun la DLT-teamo konstruis ekde 1985. Temas pri tradukado de plenaj anglalingvaj frazoj, ne-antaŭkonitaj sed fari-taj per limigita vortostoko en samsencajn francajn frazojn. Mikrokosme, do, oni testis ĉiujn ecojn de eventuala plena lingvoparo angla-franca. Kaj la rezultoj superis la atendojn. Serresumi koncize, nun evidentas ke la sis-

temo DLT povos solvi tiun problemon de la internacia komunikado, kiun ĝi elektis por si: la interŝanĝon de informoj per komputilaj retoj.

Ni aŭskultu momente, kiel decas en esperantisma revuo, la akuzan voĉon de la Movada prokuroro: „Tio havas neniun signifon por la vera venko de Esperanto! Esperanto funkcios interne de la sistemo, nevideble por la ordinara uzanto; per tiu teknika pensaĵo nia



lingvo subfosas sian propran allogon. Kaj rimarku, ĵurnistoj: DLT (almenaŭ komence) estos multekosta, postulos maŝinaron aĉeteban nur por iom grandaj firmaoj, kaj tial nur pligrandigos la lingvan-informan malekvilibron, kiu jam ekzistas en la mondo. Ni rifuzu ĉiun kunlaboron kaj varbu apogantojn por nia vivanta, egaleca, interhoma lingvo.“

Ĉu nur fantazie levigas protestoj tiaj? Kredeble ne. Tiel ni donu kelklinian atenton al la poraj voĉoj.

„Ĉu do vi atendas, ke la venkomarŝo de la tekniko respektos viajn dezirojn? Jam deko da grandaj esplorprojektoj atakas la problemon de la aŭtomata tradukado. Ne eviteblas, ke post dek jaroj tiaj sistemoj estos vaste uzataj fare de tiuj firmaoj, kiuj povos ilin pagi. La demando do

fariĝas: Kian sistemon ni volas?

DLT posedas trajtojn unikajn inter la konkurantaj sistemoj. Nur ĝi celas tradukon inter ĉiuj lingvoj, sendepende de ilia strukturo. Nur ĝi estas plene decentrigita, tiel ke ne la donanto, sed la ricevanto de la informo elektas la lingvon, en kiu la informo aperas. Kaj fine, nur ĝi baziĝas sur Esperanto.

Kiuj ajn estos la efikoj de aŭtomata informtradukado sur la uzadon de Esperanto — kaj ekzistas bonaj kialoj kredi, ke ili apenaŭ malhelpos ĝin — estas tute certe, ke la procedo de la evoluigo de DLT enorme progresigos la interlingvistikon. Por plene funkcianta sistemo en iu ajn lingvo, oni bezonas detalajn vortarojn ampleksajn terminarojn kaj bonan komprenon de la sintaksaj rilatoj inter tiu lingvo kaj Esperanto. Plue, kiel „la lingvo de artefarita inteligento“ en la DLT-kerno, Esperanto mem submetiĝos al intensaj lingvistikaj esploroj. Rezulte, el „kvazaŭ triamonda lingvo“ (pro sia relativa malmultuziteco por teknika komunikado), la Internacia Lingvo povos salti en kelkaj jaroj ĝis praktika egaleco kun la plej vaste uzataj lingvoj en la mondo.“

Super ĉi tiu helbrila horizonto ŝvebas nura nubeto. Nome, ke ne temas pri reva vizio pri la estonteco, sed pri io nuna, alarme aktuala. En la malmilda mondo de komercaj esploroj venas nur unu ŝanco. Pro manko de sufiĉe da lingvistike kompetentaj, kunlaborpretaj esperantistoj, DLT pli aŭ malpli baldaŭ fiaskus.

La nuna jaro, 1988, estos

(Sekvas sur paĝo 5)



Monda jardeko por spirita renesanco

Laŭ iniciato de UNESKO la Generala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj en sia 41-a ordinara sesio aŭtune de 1986 deklaris la periodon 1988—1997 Monda Jardeko por Evoluigo de la Kulturo, kiu estos efektivigata sub la aŭspicio de UN kaj UNESKO.

La ideo pri la Jardeko estis lanĉita por unua fojo en la Dua Monda Konferenco pri la Politiko en la Kampo de Kulturo, okazinta en Mek-siko en 1982. Poste ĝi estis diskutita en la sesioj de la Generala Konferenco de UNESKO.

Notindas, ke la ideo pri la Jardeko estis subtenita de pluraj institucioj de la sistemo de UN, same kiel de diversaj internaciaj forumoj. Do la Jardekon antaŭis multjara zorgema ĉiuflanka preparado sur diversaj niveloj.

La socialismaj landoj subtenis la ideon pri la Jardeko en ĉiuj etapoj. En majo 1987 en Sovetunio estis kreita unu el la unuaj naciaj komitatoj por la efektiviĝo de la Monda Jardeko por Evoluigo de la Kulturo.

La ĝenerala direktoro de UNESKO ellaboris projekton de dekjara agadprogramo surbaze de la proponoj de la ŝtatoj-membroj samkiel de interregistaraj kaj neregistaraj organizaĵoj. En la dokumento estas emfazitaj la ĉefaj celoj de la jardeko.

- prikonsidero de la kultura aspekto de la evoluo
- stabiligo de la kultura identeco
- plivastigo de la partopreno en la kultura vivo

- kontribuado al la internacia kultura kunlaboro

La programo celas altiri la atenton de ŝtatestistoj kaj sociagantoj de nacia kaj internacia niveloj al la problemoj de la kulturo, al ties graveco por la vivo kaj la progreso de la popoloj, samkiel al la rolo de la internacia kultura kunlaboro kiel faktoro de kultura pliriĉiĝo kaj reciproka kompreniĝo inter la popoloj.

La strategiaj celoj de la Jardeko estas intime ligitaj al gravaj problemoj de la nuntempa mondo, kiaj estas la sociekonomia evoluo, la internacia serenigo kaj la neceso plifortigi la konfidon inter la landoj kaj la popoloj, la rekonstruado de la kulturaj kaj informaj rilatoj sur justa kaj demokratia bazo.

En la agadprogramo de la Jardeko estas respegulitaj la bezono de ampleksa aliro al la kompreno de la sorto de la homaro, la viviĝo kaj konfirmado de la humanaj valoroj, plialtigo de la rolo de kreaj laboruloj, de la intelektularo. En ĝi estas enmetita maksimume vasta koncepto pri la kulturo. La plilargigita nocio pri la kulturo inkluzivas ion pli vastan ol la intelekta laboro aŭ la arta kreado — la ĝeneralan konduton de la homo, lian koncepton pri si mem, pri sia socio kaj pri la ekstera mondo.

Por unua fojo en la centro de la atento de la monda publiko estas starigitaj tiel vastskale la problemoj de evoluigo de la monda kulturo, de la humanisma kaj intelekta kunlaborado de diversaj ŝtatoj kaj popoloj. Komenciĝas unika internacia agado.

Novismon de UNESKO en starigo de la taskoj de la Jardeko konsistigas rekono de la varieco de kulturoj de egala indeco, profunda scio de tiuj kulturoj, kio estas unu el la fundamentaj apogpunktoj de la reciproka komprenigo kaj de la paco.

Apartan atenton en la koncepto pri la agadprogramo meritas la ŝlosila nocio pri malfermiteco al la akcepto de la ceteraj kulturoj. Tiu ĉi nocio estas komprenebla por la bulgara popolo, kiu ĉiam estis resonema al aliaj kulturoj.

Alia novisma aliro en la agadprogramo de la Jardeko estas la tezo, ke „la feliĉo ne povas esti importita de eksterĉ. Ĝi povas esti rezulto nur de konscia agado, volonte efektivigata de la homoj, konsciintaj la komplikecon de la starantaj antaŭ ili problemoj kaj prenantaj sur sin plenan respondecon por ties solvo.

La celoj de la Jardeko havas organikan ligon kun la koncepto pri la nova politika pensmaniero, kun la tendencoj al humanigo de la politiko, direktata al plifirmigo de la integreco de la mondo en la tuta varieco de la ekzistantaj en ĝi malsamecoj, al profundigo de la tuthomaj principoj por solvo de la taskoj de la praktika politiko.

En la agadprogramo de la Jardeko estas konturitaj du direktoj, en kiuj devas koncentri siajn penadojn ĉiuj landoj kaj popoloj, partoprenantaj en la Jardeko. Unuflanke temas pri pliintensigo de la atento al la kultura aspekto en ĉiuj grandaj procesoj de la politika, socia kaj ekonomia evoluado. Aliflanke oni supozas la stimuladon de la kreiveco kaj la kultura vivo kiel tuto. Tio ĉi esprimiĝas per la postulato: **kulturo en la politiko kaj politiko, helpanta la kulturon.**

La efektivigo de la agadprogramo de la Jardeko kontribuos por la vekado de nesupozeblaj

kreaĵ fortoj, kapablaj renovigi la spiriton mem de la internacia kunlaborado. Antaŭstaranta estas la ellaboro de deklaracio pri la rajto de la popoloj konservi, defendi kaj progresigi sian nacian kulturon.

La agadprogramo de la Jardeko entenas longtempajn kaj mallongtempajn aktivadojn flanke de preskaŭ ĉiuj institucioj de UN. Ĝi ne estas definitiva kaj pliriĉigados per la proponoj de la ŝtatoj-membroj de UNESKO kaj de diversaj internaciaj organizaĵoj. Ĝia definitiva ellaboro estos kronita per la redakto de la programo „Kulturo kaj evoluo“, kiu transpasos la kadrojn de UNESKO.

La Monda Jardeko de Evoluigo de la Kulturo helpas por la progreso de ĉiu ŝtato-membro de UNESKO. Pluraj naciaj manifestigoj efektivigos enkadre de la Jardeko kun la partopreno de internaciaj organizaĵoj kaj fremdlandaj gastoj tiamaniere, ke kiu ajn ŝtato povu profiti de la kultura kaj socia politiko de aliaj landoj.

UEA jam deklaris en la Fina Dokumento de Helsinki de la 1-a de novembro 1987, adoptita de la pac-seminario inter UEA kaj Monda Packonsilio, ke „Enkadre de UNESKO, la du organizaĵoj konsentas kunlabori en agadoj, kiu rilatas al la monda Jardeko por Kultura Evoluigo“. Nature, ankaŭ Bulgara Esperantista Asocio kiel kultura organizaĵo trovos sian lokon en realigo de la celoj de la Jardeko. Ĝi jam deklaris sian pretecon partopreni en la realigo de la agadprogramo. La Jardeko estas konvena okazo por plua disvolvo de la tezo pri la esperanta kulturo kaj por elstarigo de ties trajtoj kaj aparte de ties signifo por atingo de la celoj de la Jardeko. Krome ĝi estas trafa okazo por emfazo de la humanisma heredaĵo de D-ro L. L. Zamenhof.

Dimităr HAĜIEV,
membro de la Komisiono
por internacia agado

SURPRIZO DE LA REDAKCIO

Estimataj legantoj,

Vin atendas surprizo! En via leterkesto septembre vi trovos la revuon, sed... vestitan bele — presitan per nova tekniko. Sed, ni jam silentu, por ke vi mem trovu la novaĵojn!

La redakta komitato esperas, ke ĝiaj klopodoj por konstanta plibonigo de la revuo trovos vian aprobon. Ni kredas, ke venontjare vi ne nur restos niaj fidelaj legantoj, sed mem aktive popularigos „BE“, por ke ĝi trovu pliajn novajn amikojn.

Do abonu nian revuon kaj varbu novajn abonantojn por „BE“. . . Ne forgesu, ke en 1989 ni festos la 70-jariĝon de „Bulgara Esperantisto“! Grava jubileo, ĉu ne?

„BE“

Forumo de MEM

„BULGARA ESPERANTISTO“ — DISTINGITA DE MEM

En sia XI Ĝenerala Konferenco Mondpaca Esperantista Movado (MEM) distingis la redakcion de „Bulgara Esperantisto“ per sia honor-insigno okaze de la 35-jariĝo de tiu internacia organizo kaj pro elstara aktivado kaj bonaj rezultoj de la redakcio sur la kampo de pachtalo kaj por progreso pere de la internacia lingvo Esperanto.

29.4.—1.5.1988 en Budapeŝto okazis la XI-a Ĝenerala Konferenco de Mondpaca Esperantista Movado (MEM), kiu feliĉe koincidis kun la 35-a datreveno de la organizaĵo. Honora protektanto de la konferenco estis prof. d-ro László Sztanyik B., prezidanto de la Hungara Packonsilio, ano de la prezidio de Monda Packonsilio. La konferencan partoprenis 186 delegitoj el 18 landoj. Bulgarion reprezentis 16-persona grupo fronte de pacamiko Violin Oljanov, ĉefredaktoro de gazeto „Paco“ — presorgano de MEM.

La posttagmezo de la 29-a de aprilo estis dediĉita al anticipaj kunsidoj de la sekretariaĵo kaj de la Internacia Komitato. Tio ebligis la aktivuloj aŭskulti la raportojn de la sekretarioj kaj de la vicprezidanto William Gilbert (tralegitaj de la prezidanto de MEM d-ro Imre Pethes pro foresto de tiuj funkciuloj), de la ĉefredaktoro de „Paco“, la redaktoro de „La Pacaktivulo“ kaj la centra kasisto.

La vespermanĝo okazis en la granda halo de kulturdomo „Lang“ kaj dank' al la bonega organizo fare de la gastigantoj ĝi transformiĝis en gajan interkonan vesperon kun multe da dancoj kaj ŝercoj en amika-intima etoso.

La 30-an de aprilo je la 9-a horo matene la XI-a Ĝenerala Konferenco de MEM estis solene inaŭgurita. Post la salutparoloj de la honora protektanto, de la reprezentanto de UEA — prof. d-ro Ottó Haszpra kaj de la reprezentanto de Hungara E-Asocio — d-ro Árpád Rátkai la delegitoj aŭskultis la detalajn kaj interesajn raportojn de la prezidanto de MEM kaj de ĝia ĝenerala sekretario Clément Tholet. Emociiga momento estis la distingo per honora insigno de aktivuloj-pacdefendantoj. Por nia granda ĝojo estis kvar unuopaj kavaliroj el nia lando: Vasja Cvetkova, Vasil Peevski, Hristo Gorov kaj Kunčo Vălev.

Krome insignojn ricevas E-societo „Hristo Kozlev“ el Polski Trâmbeŝ kaj la redakcio de „Bulgara Esperantisto“.

Dum la du konferenc-tagoj parolis pli ol 10 delegitoj, rakontante pri sia sperto en la laboro por konservo de la paco, pri siaj kontaktoj kun neesperantistaj pacorganizaĵoj. Cie sentebli la deziro vivi pace, ne minacate de nuklea milito. Ĉiuj emfazis sian maltrankvilon pro la fakto, ke nun en la mondo estas akumula grandega nuklearmila forto, kiu povus eksplodigi nian planedon. En komuna rezolucio aprobita fine de la konferenco la partoprenantoj alvokas ĉiujn pacamajn esperantistojn el la tuta mondo uzi la internacian lingvon Esperanto por krei kontaktojn, klarigi, varbi, eduki pri la paco kaj kondamni ĉiusspecajn perfortojn kaj militojn.

Aparte de la plenkunsido kunvenis ankaŭ laborgrupoj pri redaktoraĵoj, organizaĵoj kaj virinaj aferoj. Dum la redaktora kunsido estis preparolita la laboro de la redakciaĵoj de „Paco“. La ĉeestantaj ĵurnalistoj kaj redaktoroj profesie pridiskutis la eblecon evoluigi la gazeton ĉiam pli kaj pli. Per komunaj sugestoj estis ellaborita plano por plua plibonigo de la presorgano de MEM.

Intereson prezentis ankaŭ la kunsido de la virinkomisiono, gvidita de Milada Hemerková. Tie estis starigitaj demandoj pri la edukado de la infanoj tiel, ke ili ne adoptu la plej abomenajn malvirtojn: envion, malamon, malamikecon, ke ili ne alkitimiĝu al fumado kaj narkotismo. Estis pritraktita la problemo pri partoprenado de la virinoj en la laboro por paco kaj amikeco inter la popoloj.

La 1-an de majo 70 delegitoj partoprenis la festan manifestacion de budapeŝtanoj kiel gastoj sur la tribuno. Posttagmezo la plenkunsido aprobis agadplanon kaj elektis novan gvidantaron.

Dum sia konkluda resumo la prezidanto de MEM d-ro Imre Pethes substrekis, ke la konferenco funkciis aferece, estis faritaj multaj utilaj proponoj kaj aŭskultitaj interesaj raportoj, respegulantaj la tutmondan esperantistan pacmovadon.

Dank' al la bonega organizlaboro de la gastigantoj la delegitoj pasigis sian ne multan libertempon tre agrable. Grandan intereson vekis la popolstilaj dancoj en plenumo de junulara dancensemblo kaj la horo de gelernantoj, kiuj plenumis ampleksan belartan programon (la 30-an de aprilo vespere). Multajn aplaŭ-

dojn gajnis ankaŭ la junpionira grupo el Tbilisi, kun gvidantino Lamara Cuckiridze. La 11 infanoj kantis kaj dancis dum preskaŭ unu horo en la adiaŭa vespero kun tia entuziasmo, ke fine ankaŭ la publiko komencis kunkanti la melodiojn kaj aplaŭdi. Okaze de la Unuamaja festo la sovetia delegitaro okazigis improvizi-tan koktelon, kiun ĉeestis reprezentantoj de ĉiuj partoprenantaj landoj kaj kie denove oni interŝanĝis opiniojn pri kunlaboro.

La 2-an de majo la membroj de la sekreta-riato de MEM estis akceptitaj en la hungara Nacia Packonsilio.

La XI-a Generala Konferenco de MEM starigis multajn novajn taskojn ne nur al la MEM-anoj, sed al ĉiuj pacemaj esperantistoj en la mondo. Jam estas tempo malkateni nian

pensmanieron kaj malfermi la rondon de E-parolantoj al la neesperantista publiko, serĉi kontaktojn kun ĝi, varbi novajn adeptojn de la Lingvo kaj de la Movado, celadi komunajn arangojn kun la neesperantistaj pacorganiza-joj, konvinki la diversnacianojn trovi komu-nan lingvon inter si — la lingvo Esperanto, lingvo de bonnajbareco, interhelpo kaj pacol

Veneta BALEVA

BULGAROJ—MEMBROJ DE INTERNACIA KOMI-TATO DE MEM:

Nikola Aleksiev — honora prezidanto de MEM; Veneta Baleva; Vasja Cvetkova; Dimităr Haĝiev; Fani Mi-hajlova; Violin Oljanov; Ĥristo Manolov; Kanjo Ka-nev; Cvjatko Todorov.

POSTKONFERENCA EKSURSO

Post la fino de XI Generala Konferenco de MEM 13-persona bulgara grupo vizitis la slovakajn urbon Bratislava. En la bulgara kultura klubo „Georgi Dimitrov“ okazis renkontiĝo inter bulgaraj samideanoj kaj d-ro František Sătura, kiu dum unu horo rakontis pri la E-vivo en Slovakio, pri la nunaj problemoj kaj pri bone plenumitaj taskoj. Li detale konigis la historion

de la E-movado en Bratislava kaj faris konkludojn pri ĝia nuna stato.

Vespere la redaktorino de „Paco“ Veneta Baleva, la aktorino Reni Kitanova kaj la aktivulino de BEA Penka Fileva vizitis la E-klubejon kaj ĉeestis kunsidon kaj E-lecionon. Impresojn pri la XI MEM-konferenco rakontis V. Baleva. Poste la gastoj respondis al diversaj demandoj.

V. D

RADIO SUMEN EN ESPERANTO

Sumenaj esperantistoj jam havas unuigitan teritorian Esperanto-societon, kiu estis establita fine de marto. La societo akceptis la nomon „Vekiĝo“, kiu estis donita al la unua Esperanto-societo en Sumen jam en 1905, la jaro de ĝia fondiĝo.

La nova societo jam havas siajn atingajojn.

Ekde aprilo Radio Sumen disaŭdigas Esperanto-novaĵojn unufoje monate, ĉiun lastan dimanĉon, en la rubriko „Dimanĉaj meridianoj“. Tiun rubrikon oni emisias de la 17,00 ĝis 17,40 h, per mezlongaj ondoj (312 m).

Radio Sumen aŭdeblas en

la regiono de la eksaj distriktoj Sumen, Targoviŝte, Razgrad, Ruse, Tolbuĥin, Varna, kaj supozeble ankaŭ en aliaj regionoj — ekz. Burgas, Sliven, Jambol, Veliko Târno-vo ktp.

La unua elsendo estis efektivigita la 24-an de aprilo j. k. Kuragigaj leteroj al la redakcio de Radio Sumen estas bonvenaj. Ĉiuj Esperanto-societoj en la regiono de Radio Sumen estas petataj certigi informojn pri sia agado. Tiamaniere ni plibonigos nian programon kaj faros ĝin pli varia kaj interesa ankaŭ por neesperantistoj.

La materialojn oni sendu rekte al Radio Sumen aŭ al E-societo „Vekiĝo“ — Sumen, 9700, PK 60, por la radioelsendo.

Kunlabore kun la entreprenoj „Knigorazprostranenie“ en Sumen en la librovendejo „Nahodka“ en la centra urbostrato jam funkcias vendofako por esperanta literaturo, lernolibroj kaj lerniloj. Gesamideanoj gastantaj en Sumen nepre vizitu la vendejon kaj ĝuu tiun nian gravan atingajojn.

Ĥristo TONEV

ESPERANTO KAJ KOMPUTILOJ

(Daŭrigo de paĝo 11)

periodo de planado por DLT. En la desegno vi povas vidi, ke la dua fazo de la projekto estos konsiderinde pli intensa: de 6 milionoj kaj 30 hom-jaroj (1984—1988) la labor-kvanto kreskos ĝis 12 milionoj kaj 85 hom-jaroj (1989—1991). Kaj jam nun la projekto frontas la urĝan demandon, ĉu eblos trovi sufiĉe da laborforto por sukcesigi tiun duan fazon. El ĝi devos rezulti plena lingvo-paro angla-franca, preta por enmerkato en 1992, plus kelkaj aliaj lingvo-moduloj, kiuj montras la kapablon de la sistemo universaligi. Kaj se tiu fazo sukcesos... tiam denove venos plivastigo, eventuale ĝis eksplosoda multnacia kresko.

Jen revo, ja ne tiel vasta kiel tiu de la Movado, sed jam per si mem giganta. Por efektiviĝi ĝin, la DLT-teamo decidis iri tien, kie plej multas la esperantistoj: Orienta Eŭropo. Ene de unu jaro devus ekfunkcii „Interlingvistik-Teknologio-Centro“, en aŭ proksime de la socialismaj landoj (konsideratas dekkvino da urboj inter Bjalistoko, Pollando, kaj Zadar, Jugoslavio, inkluzive de la aŭstriaĵoj Vieno kaj Graz). Tiu centro okupiĝos pri la ellaboro de novaj lingvo-moduloj kaj pri vasta kvanto da leksikologia laboro — la produktado de vortaroj kaj terminaroj, la kompilado de t.n. tekstokorpusoj kaj la komparado de tekstoj tradukitaj inter Esperanto kaj aliaj lingvoj. La antaŭvidataj 16 laborantoj plimultiĝos ĝis trideko, se la fazo 1989—1991 nur sukcesos allogi pliajn investojn.

La sorto de DLT dependas de tiu trijara periodo. Tial la tempo urĝas. Aparte la movada junularo frontas grandegan ŝancon elekti lingvistikan karieron, kiu ne nur pro-

Bruselo, 25.04.1988 (De la propra korespondanto de gazeto „Pravda“). Ĉu Esperanto ne povus fariĝi tiu lingvo, kiu helpus krei senriproĉe funkciantan sistemon de maŝina tradukado? Tiun ĉi demandon starigis al si la esploristoj el la elektronika firmao „BSO“ en la nederlanda urbo Utreĥto. Estas sciata, ke tiu planlingvo distingiĝas per tre simpla gramatiko. En ĝi ĉiu vorto estas prononcata tiel, kiel ĝi estas skribata. El tiu vidpunkto ĝi prezentas grandan intereson por plene aŭtomata tradukado.

Nuntempe la nederlandanoj eksperimentas pri tradukado el la angla en la francan kaj inverse. Estonte oni intencas plimultiĝi la nombron de eksperimentaj lingvoj. La avantaĝojn de tiu novaĵo ĝiaj kreantoj vidas en tio, ke la donanto kaj la ricevanto de la teksto povas labori per tute ordinariaj personaj komputiloj, aplikante limigitan kvanton da programoj, ĉar la sukcesa tradukado en Esperanton el la plej gravaj mondlingvoj jam de longe estas pruvita en la praktiko.

Oni supozas, ke la unuaj reale funkciantaj sistemoj de simila tradukado estos aplikataj jam en 1992.

mesas longtempan fruktodonan laboron, sed ankaŭ grand-skale helpas la Esperantan lingvistikon. Ne temas nur pri eŭropanoj, cetero: parolantoj de la turka, la persa, la araba, la hinda, la ĉina, la japana, la svahila... ĉiuj pli aŭ malpli frue enplektigis.

Kaj ni ceteraj? Restas la tasko, diskonigi la progreson de DLT inter ĉiuj esperantistoj potencie varbeblaj por la projekto: Junulo, ekzemple, kiu hezitas studi la lingvistikon pro dubo pri posta dungigo; trejnita lingvisto, al kiu mankas taŭga posteno; talenta amato, kiu pretus profesiigi. Ekstermovade, la „hoko“ de DLT bele subtenos provojn kapti la intereson de lingvofakuloj. En la venontaj jaroj ekaperos, interalie, esperantologiaj studoj en la

angla; tiuj estos plia ero en singarda strategio de DLT, prepari la grundon por fekunda ekkresko post la nuna frua printempo.

Kiom grandaj finfine estas la ŝancoj de DLT? Toon Wilkam konfidas, ke inter la deko da grandaj projektoj nur la japanaj pli proksimas al enmerkato — eventuale tiel kaptonte la grandan merkaton por la japana-angla paro. Ekster tio, DLT estas en elstara pozicio. La venontaj kelkaj jaroj formos iusence la plej rigoran teston de la Esperanto-movado, kiun preter la simpla pluvivado ĝi iam ajn frontis. Ĉu ni progresis sufiĉe en cent jaroj? Malgraŭ nia volo, la mondo mem starigas nun la demandon.

Mark FETTES

DLT reprezentigos en diversaj arandoj ĉi-jare, inkluzive de la Internacia Junulara Kongreso en Zagrebo kaj la Universala Kongreso en Roterdamo. Tie eblos pli detale konatiĝi kun la projektoj kaj ĝiaj kunlaborantoj.

El „Esperanto“ n-ro 3/88

Jaro de Grabowski

La Ĉefa Konsilio de Pola Esperanto-Asocio decidis, ke la jaro 1988 estu „Jaro de Grabowski“, dezirante omaĝi la elstaran esperantiston kaj grandan filon de la pola popolo.

Antoni Grabowski naskiĝis la 11-an de junio 1857 en Nowodobre apud Chelmino, mortis la 4-an de julio 1921 en Varsovio. Esperanton li eklernis en 1887. Inter li kaj Zamenhof okazis la unua Esperanto-konversacio. Ĝis tiam Zamenhof parolis en Esperanto nur kun siaj hejmanoj.

Grabowski vigle partoprenis en la movado. Ekde 1904 li estas prezidanto de Varsovia Esperanto-societo. En 1905 li sekretario dum la Unua Kongreso en Boulogne-sur Mer, dum kiu li ankaŭ kunfondas kaj eniras la Lingvan Komitaton. En 1908 li okupas la prezidantecon de Pola Esperantista Societo kaj tenas dum sia tuta vivo ĉi tiun postenon. En 1908 li eniras la novefonditan Akademion de Esperanto, kiel membro kaj direktoro de la Gramatika Sekcio. En 1912 li pledas por Jubilea Kongreso en Varsovio, sed ne sukcesinte trabori la carisman politikon de premado, li aktive kunorganizas la kongreson en Krakovo, kiel vicprezidanto de la organiza komitato. Dum tiu ĉi kongreso estis surscenigita por la unua fojo en Esperanto la fama opero „Halka“, tradukita de Grabowski. Dum la sama kongreso oni prezentis ankaŭ alian faman polan verkon, la teatraĵon „Mazepa“, same traduko de Grabowski.

Dum la milito li komencis kaj finis la tradukon de „Sinjoro Tadeo“ de la plej fama pola poeto Adam Mickiewicz. Li preparis poemantologion „El parnaso de popoloj“, tradukitan el 29 lingvoj.

Kiel lingvisto Grabowski prezidis la gramatikan sektion de la Akademio. Li estas verkinto de „Granda vortaro Pola-Esperanta kaj Esperanto-pola.“

Lia originala poezio ne estas tre ampleksa, sed oni devas menciigi la faman „Tagigon“, kvaŝaŭ dua himno esperanta, kaj la kortuŝan „La reveno de la filo“. Li estas kuraĝa evoluinto de la poezia lingvo Esperanta. Prave oni nomis lin „Patro de la Esperanta poezio“. Li estas lingvo- kaj versartista. Li lasis al la esperantistaro brilajn tradukojn: „La neĝa blovado“ de Puŝkin; „La gefratoj“ de Sienkiewicz; „Pekoj de infaneco“ de Prus k. a.

Post la Unua Mondmilito Grabowski rekunfondas en renaskiĝinta Pollando Polan Esperantistan Societon kaj estas elektita ĝia honora prezidanto, bedaŭrinde ne por longa tempo

pro la trafinta lin korinfarkto. En 1933 oni inaŭguris memortabulon al Grabowski ĉe la strato Hoza 42, ĉe la domo, en kiu dum pluraj jaroj vivis kaj laboris Grabowski. La tabulon detruis Gestapo dum la Dua Mondmilito.

Por omaĝi Grabowski, Pola Esperanto-Asocio reeldonas liajn tradukojn de „Sinjoro Tadeo“ kaj „Halka“, „El parnaso de popoloj“ kaj „Neĝa blovado“.

A. GRABOWSKI

LA TAGIGO

Agordu la brustojn, ho nia fratar',
Por nova, pli vigla jam kanto!
Ĝi sonu potence de montoj al mar'.
Anoncu al ĉiu dormanto:

Tagigo, tagigo radias en rond',
La ombroj de nokto forkuras el mond'.

Post la longa migrado sur dorna la voj'
Minacis nin ondoj de l'maro;
Sed venkis ni ilin kaj velas kun goj'
Al verda haven' de l'homaro.

Post longa batalo, maldolĉa turment'
La stela standardo jam flirtas en vent'.

Se venus ankoraŭ ventegoj, batal',
Ni estas jam bone harditaj;
Esperon ne venkos la fajro, nek ŝtal',
Nek ies perfidoj subitaj.

Nenio en mondo elŝiros ĝin for,
Ĝi havas radikojn profunde en kor'.

Ni velas antaŭen kun kredo, fervor',
Benante la Majstron por verko,
Kaj lian anaron, de plej frua hor'
Fidelan al li, ĝis la ĉerko.

La mond' aliigos, la temp' pasos for,
Sed vivos eterne pri ili memor'.

La lingvo benata montriĝis al ni
Mirinda donaco ĉiela:
Per amo al hejmo, patrujo, naci',
Ni flamas en koro fidela.

Kaj same fidelaj al hejma altar'
Ni sentas nin filoj de l'tuta homar'.

En ĉiu mondparto, en ĉiu ter-zon',
En koroj de centoj da miloj
Jam vibras por nia saluto reson',
Do kantas de l' tero ni filoj;

Tagigo, tagigo radias en rond',
La ombroj de nokto forkuras el mond'!

HECTOR HODLER — LA FONDINTO

La plej grava internacia Esperanto-organizo, UEA multe ŝuldas al sia fondinto kaj financa subtenanto Hector Hodler. Li naskiĝis la 1-an de oktobro 1887 en Genevo kiel filo de la fama pentristo Ferdinand Hodler. Vera civitano de sia lando, Hector posedis ĉiujn ecojn de la svisa popolo — laboremo, digno, virto. Li estis fidela amiko de Edmond Privat, lia lernejkamarado. Jam kiel liceanoj ili fondis Esperanto-klubon kaj gazeton „Juna Esperantisto“. Dum kelkaj jaroj ili redaktis, administris, skribis adresojn kaj ekspedis la gazeton, ĝis transprenis ĝin Presa Societo Esperantista en Parizo. Hector regule verkis por la tutmonda ilustrita revuo „Tra la mondo“ kaj majstre tradukis la novelon „Paolo kaj Virginio“ de Saint Pierre.

Unuafoje li partoprenis internacian kongreson en 1906 en Genevo. Inter la 1300 delegitoj el dekoj da landoj, li ekkonis iujn interesajn individuojn. Unu el ili estis profesoro Rousseau, matematikisto, la alia — Alfonso Cartes, ambaŭ el najbara Francio. Per kio ili interesis lin? Junulo praktike, Hodler konsciis, ke Rousseau kaj Cartes povas fari ion utilan por la movado. Cartes estis enkondukinta, laŭ propra iniciato, honoroficajn Esperanto-konsulojn en diversaj urboj, dum Rousseau instalas Esperanto-oficejojn. Jen konvena bazo por estonta internacia organizo esperantista.

Hodler pensis ankaŭ pri la praktika uzebleco de Esperanto. Li opiniis, ke oni ne devas apartigi la mondlingvan movadon de la aliaj sociaj movadoj. Nur tiel Esperanto povas esti utila por la homaro.

En 1907, 20-jara junulo, li prenis sur sin la redaktadon de gazeto „Esperanto“. Lia celo estis fari ĝin centra organo de la esperantistoj. En daŭro de 13 jaroj li skribis por ĝi gravajn artikolojn, tradukis beletraĵojn. Samtempe la gazeto laboris por la ideoj de Rousseau kaj Cartes, t. e. „por kreo de fortika ligo de solidareco inter diverslingvanoj“ per la sistemo de la konsuloj, kies nombro kreskis senĉese. La 3-a UK de Cambridge, Britlando, konstatis, ke preskaŭ 200 konsuloj laboras tra la mondo. Fondita la 28-an de aprilo 1908, UEA deklaris ilin siaj delegitoj.

Gravan servon al la homaro faris UEA dum la Unua Mondmilito.

H. Hodler kaj la sekretario de UEA Hans Jakob organizis en septembro 1914 Dumilitan Servon. Pri kio temis? Nome pri helpo al personoj, kiuj troviĝis surprizitaj de la milito en malamikaj landoj kaj ne plu havis la eblon korespondi kun siaj parencoj kaj amikoj.



UEA, sidanta en neŭtrala lando, informis siajn delegitojn en la malamikaj landoj, ke ĝi volonte servos kiel peranto por intersaĝo de privataj korespondadoj inter la malamikaj landoj. Kompreneble, politika aŭ militista aludo estis severe malpermesataj. Leteroj devis alveni al UEA malfermitaj. Siaflanke la oficejo de UEA en Genevo transsendis ilin laŭ la dezirata adreso. Variis la enhavo de la leteroj. Ekz. franca patrino skribis al sia filo en Germanio. Aŭstria knabino al fianĉo en Anglio. Kortuŝaj korespondadoj, homaj amoj, esperoj trapasis la oficejojn de UEA, kie multaj lokaj esperantistoj helpis. La faritaj dum la milito servoj estis 200 000!

Esperanto alportis ĝojon kaj helpon ankaŭ al la homoj suferantaj en la militkaptitejoj. Hodler rekomendis al la delegitoj de UEA viziti tiujn lokojn kaj interfratigi kun la „malamiko“. En diversaj landoj ili faris tion. Unu el la militkaptitoj estis la hungara esperantisto-poeto Julio Baghy. En malproksima Ruslando, en Siberio, li interfratiĝis kun rusaj esperantistoj. Iu el ili informis lin pri la morto de Zamenhof.

Baghy versis:

La famon ne brue,
Nur poste malfrue,
Simile al eĥo de mortkrio
Mallonga sciigo alportis:
„La majstro mortis“.

Tiu ĉi homama agado organizita de UEA estis ebla dank' al la nobla karaktero de Hodler. En 1915 li skribis en „Esperanto“: „Neniu popolo havas la monopolon de la civilizacio, de la kulturo aŭ de la humaneco... Por inde plenumi nian taskon, ni konservu nian idealon kaj ne lasu lin supremi mal-espero. Eterne ne daŭros la blekado de la kanonoj...“

Li pensis kiel reorganizi la movadon post militfino. Li intencis tion proponi dum la 12-a Kongreso, okazonta en Den Haag, Nederlando en 1920. Tamen la morto etendis sian ostecan manon pli frue — li forpasis la 31-an de marto 1920, atinginte nur 33 jarojn. Hodler heredigis al UEA grandan parton de sia havaĵo kun la celo certigi ĝian ekzistadon.

E. Privat skribis: „Al tio kion iniciatis la genio de Zamenhof sur kampo lingva, Hodler aldonis la necesan bazon sur kampo socia.“

Nun UEA agadas laŭ la testamento de Hodler. Ĝi estas membro-asocio de UNESKO en plej alta kategorio de neregistaraj asocioj; ĝi havas sian oficejon ĉe UN en Nov-Jorko; ĝi kunlaboras kun Monda Packonsilio. La fakasocioj kunlaborantaj kun UEA iras la saman vojon. La Monda Federacio de Sciencaj Laboristoj eldonas sian organon „Scienca Mondo“ ankaŭ en Esperanto. La Internacia Kibernetika Asocio enkondukis Esperanton paralele kun la angla kaj franca. La Internacia Ekologia Konferenco SVIEKO'81 alprenis Esperanton inter la laborlingvoj. Por la Komputersciencia societo „J. Neuman“ Esperanto estas la nura laborlingvo por fakuloj el 19 landoj...

La nomo de Hector Hodler, kies 100-jariĝon la tutmonda esperantistaro festis pasintjare, restos por ĉiam en la analoj de nia movado, ĉar li unua montris la vojon al praktika utiligo de Esperanto, kreante tiucele internacian organizon — Universala Esperanto-Asocio.

Aristo ISKROV

La metodo de Andreo Cseh

ELSTARA CSEH-METODA INSTRUISTO DIVIDAS
SPERTON

(Daŭrigo de n-ro 6/1988)

Andreo Cseh naskiĝis en 1895. Hungaro laŭ deveno, li por unua fojo demonstris sian instruprocedon en 1920, en laborista medio en Rumanio, kie li loĝis. La kurso havis tre grandan sukceson. Baldaŭ tiu ĉi metodo transpasis la limojn de Rumanio. Dum 1928 Andreo Cseh gvidis sukcesplenajn kursojn en Stokholmo (Svedlando). En aprilo 1929 la Sveda Instruista Esperanto-Federacio en Stokholmo stenografis laŭvorte la lekciojn de Andreo Cseh kaj eldonis ilin sub la titolo: „KURSO DE ANDREO CSEH“. Fakte tio estis gvidilo, destinita por la geinstruistoj, kiuj partoprenis liajn kursojn kaj esprimis deziron instrui Esperanton laŭ tiu ĉi metodo.

Poste kun gesinjoroj Insbrucker oni fondis en Arnhem (Nederlando) la Internacian Cseh-instituton (nun Internacia Esperanto-Instituto — post la morto de Andreo Cseh). Tie oni okazigas kursojn por la estontaj instruistoj de Esperanto laŭ la metodo de Andreo Cseh kaj eldonadis la monatan revuon „La Praktiko“ — organo de la Universala Ligo, fondita en 1932.

Laŭ la Cseh-metodo oni povas facile, amuze kaj rapide atingi bonegajn rezultojn. Tamen ĝi postulas de la instruistoj tre altajn kvalitojn.

La bazaj principoj de Cseh-metodo laŭ Enciklopedio de Esperanto, I-a volumo, p. 87 estas:

1. neuzado de nacia lingvo, klarigado de novaj vortoj per la jam instruitaj
2. neuzado de lernolibroj
3. komuna ĥora respondado de la kursanoj
4. aplikado de konversacio pri aktualaj, anstataŭ uzado de lernecaj ekzemploj.
5. riĉa aplikado de humoro kaj ŝercoj
6. instigado de la lernantoj, ke ili mem eltrovu la regulojn de la lingvo kaj ke ili mem konstruu gramatikan sistemon.
La devizo estas: „forte, kuraĝe kaj elegante“.

Andreo Cseh jene klarigas sian koncepton: La kursmaterialo estas destinita por elementa kurso, do ĝi entenas la elementan gramatikon kaj celas kapabligi la kursanojn al simpla konversacio pri la plej necesaj ĉiutagaj aferoj. La celo estas ebligi al la publiko, ke ĝi povu post du-trimonata lernado vere uzi la lingvon en korespondado kaj parolo. Tamen oni ne ŝarĝu la lernantojn per multe da vortoj. La ampleksigo de la vorttrezoro restu tasko de la praktiko mem. Fari sporton el instruado de vortoj estas sensenca laboro: verŝi akvon en senfundan barelon. Anstataŭ tio mi preferas instigi la lernantojn esprimi siajn pensojn en simpla maniero, kaj okaze de malhavo de necesa vorto per ĉirkaŭskribo (baza principo). Tiamaniere la kurso utilas ankaŭ kiel ekzerco de pensado.

La metodo estas kombinaĵo el la gramatika kaj la rekta metodoj, konforme al la specialaj ecoj de Esperanto. Dum en la naciaj lingvoj la gramatiko estas labirinto konfuziga, en Esperanto ĝi estas tiom klara, ke ni tute ne bezonas eviti ĝian instruadon. Male: la instruado de Esperanto devas esti gramatika. Tial mi ordigos la instruatajn gramatikaĵojn en ne sistema sinsekvado gradigita. . . Dum la kursoj mi ne donas la oficialajn nomojn de la gramatikaj elementoj. Efektive ili neniom utilas kaj mi opinias, ke tio povas resti tasko de la komenco de la daŭriga kurso. . . Mi klopodas konduki la lernantojn tiel, ke ili mem eltrovu la solvon de gramatikaj problemoj kaj ili mem konstatu la regulon. La efiko de tia procedo estas, ke la lernanto streĉas la atenton kaj pensadon, ĝojas pri sia eltrovo kaj tiu travivaĵo utile servas la komprenon kaj memoron. Mi ne faras komparon inter la reguloj de Esperanto kaj aliaj lingvoj, ĉar tio malofte utilas, ofte malutilas pro la kaprica malordo en la naciolingvaj gramatikoj. Aliflanke, la rekta metodo donas grandajn avantaĝojn: la tujan parolan uzon de la lingvo, instigon pensi en la lernanta lingvo, bonan kaj facilan perceptadon pro demonstrado ktp. Cseh volis profiti la avantaĝojn de ambaŭ metodoj per kombinaĵo.

La konversacia formo ludas gravegan rolon kaj ĝi servas la devizon: paroligi la lernantojn. Ni klopodu, ke la kursanoj parolu pli

multe ol ni mem dum la lecionoj. Tion mi atingas per demandoj, kiuj postulas negativan respondon. Ekzemple anstataŭ demandi: „Kio estas la hundo?“ mi preferas demandi: „Ĉu la hundo estas floro?“, por ricevi ne la mallongan respondon: „La hundo estas besto“, sed la longan: „Ne, la hundo ne estas floro, sed ĝi estas besto“. Per tio la lernantoj havas okazon al multa praktikado de la parolo kaj krom tio la respondo estas tre facila, ĉar la unua parto de la respondo estas simpla ripeto kaj dum tiu mekanika ripeta parto, la lernantoj havas tempon por komforte pripensi la donatan pozitivan parton de la respondo.

Kuna respondado havas du utilojn: unue ĝi kuraĝigas tre modestajn personojn al respondado, due, ĝi ŝparas multan tempon, kiun bezonas la individua demandado. Ĉe la sistemo de kuna respondado povas partopreni en unu kurso grandnombra lernantaro. Tamen, kompreneble, oni aplikas ankaŭ individuan demandadon de tempo al tempo.

La nacia lingvo ne estas uzata en la kurso. Nur en la komencaj lecionoj la instruisto bezonas la helpon de tradukisto, precipe por rompi la eble enuigan monotonecon de la gramatikaĵoj. La nacian lingvon oni uzu nur ĉe ekstrema neceso. Ĝia uzado povas esti tre utila ekster la lecionoj, precipe ĉe la publika korektado de hejmaj laboraĵoj.

Fremdlanda instruisto estas tre grava utilaĵo. Ne nur el la reklama vidpunkto, ĉar fremdulo estas ĉiam pli alloga, ol samlandano, sed ankaŭ pro tio, ke la lernantoj tuj, de leciono al leciono, havas la ĝojigan kontentecon, ke ili jam povas per la lernata lingvo interkompreniĝi kun alinaciano. Do la lernantoj tuj travivas la praktikan utilecon de la lingvo kaj ricevas bonegan argumenton pri la uzebleco de Esperanto inter diversnacianoj.

Aliflanke la instruisto mem gajnas el tia situacio, ĉar la manko de komuna nacia lingvo devigas lin pli atente kaj energie labori. Mi opinias, ke rektametodan kurson laŭregule devas gvidi alinacia instruisto, ĉar nur tiam estas vere natura la neuzado de la nacia lingvo.

Sen lernolibroj okazas la Cseh-kursoj (vidu la argumentadon p. 1).

Kapti la atenton — jen la ĉefa tasko de la instruisto, ĉar ĝi estas la ĉefa kondiĉo de la sukceso. Instrui al malatentemaj personoj egale skribi sur akvon. Sed teni fiksita la atenton dum la lecionoj estas tre malfacila tasko. La lecionoj okazas vespere, la lernantoj estas

lacaj pro la dumtaga laboro. La instruisto devas esti vera sorĉisto, por fari tion per ordinaraĵoj rimedoj. Severa disciplino, perforta streĝigo de la atento ne helpas, sed eĉ malutilas. La sola maniero sukcesi estas: lerte eluzi la psikologiajn faktorojn. Tial mi elektis la jenan regulon: ligi ĉiun instruadon al agrabla, amuza travivaĵo. Tiamaniere proponitan instruadon oni firme fiksas kaj tenas en sia memoro kaj la instruisto ne skribas sur akvon, sed ĉizas sur ŝtonon.

Anstataŭ seka lingvokurso ni faru agrablan konversacion kun allogaĵoj, dum kiuj la partoprenantoj senkonscie, ofte eĉ kontraŭvole lernas. Ja ekzistas modernaj kuracistoj, kiuj sanigas per rido, do ankaŭ ni ne timu provi instrui per rido. Tia provo estas mia kurso kaj se oni serĉas por ĝi ĝustan adjektivon, tiam ĝi devas esti proksima al la vorto „psikologia“. Des pli, ke mi ne rifuzis utiligi en la kurso iom el la rezultoj de la psikoanaliza scienco. Pri tio mi ne deziras paroli pli detale. Kompetenta observanto rimarkos ĝin en la lecionaj tekstoj.

Ĉiu laboranto kun homoj — do ankaŭ la lingvo-instruisto plej prudente agas, se li klopodas ekkoni la homan psikon kaj se li poste uzas tiun konatan psikon kiel fundamenton por la konstruado. Tiam lia laboro certe ne restos senfrukta.

Hejma laboraĵo estas laŭvola. Por eviti la impreson pri lernado mi uzas demandarojn laŭ la aldonitaj modeloj. La respondado estas pli amuza ol laboriga, sed tamen ĝi devigas al la praktikado de multaj gramatikaj aferoj. El la respondoj oni povas kompili statistikon, utiligeblan por kursfina amuzo.

Sanĝoj en la kursmaterialo estas eblaj, depende de la personeco de la instruisto kaj de la klereco kaj intereso de la kursanaro. Sed sanĝoj okazu nur en la interparoloj kaj eble ankaŭ en la vortprovizo, tute ne en la gramatikaĵoj.

En porinfanaj kursoj la akuzativon oni enkonduku per ekzemple „manĝas la ĉokoladon“, „batas la hundon“ kaj „li tuŝas ŝin“ anstataŭ „amas“; ĉar la feliĉaj infanoj ja ne havas komprenon kaj intereson pri tiu vorto.

Por infan-kurso devas ankoraŭ ellaboriĝi tute speciala tekstaro.

Doc. Georgi DIMOV,
Varna

(Daŭrigo en n-ro 9/88)

LA ETIMOLOGIO KAJ ORTOGRAFO DE „NUMISMATIKO“

Mi planas verki serion da artikoloj kun la celo kompili terminaron pri numismatiko en Esperanto. Mi scias ankoraŭ ne ekzistas tiuspeca verko en nia lingvo. Laŭ la ĉapitro titolita „Fakaj Terminaroj“ en *Esperanto en Perspektivo*, jam estis publikigitaj kvin filatelaj terminaroj en 1903, 1913, 1914, 1928 (dua eldono en 1945) kaj 1962, do estas nekompreneble, kial ĝis nun numismatoj en Esperantujo ne havas sian propran liston da fakesprimoj. En apartaj eseoj mi pritraktos diversajn aspektojn de la numismatiko kaj provos starigi principojn por la esperantigo de fakaj terminoj registritaj en numismatikaj vortaroj en etnaj lingvoj. Kie estas eble, mi proponos gvidliniojn por la kompilado de terminoj, por ke la sekvaj trajtoj karakterizu ilin: (1) internacieco, (2) klaraj kaj neambiguaj difinoj, (3) facila prononco, (4) analoga formo kun aliaj etimologie kaj semantike parencaj vortoj, (5) facila ebleco por pluformado, kaj (6) ekonomia uzo de radikoj.

Unue, estas necese diri kelkajn vortojn pri la termino „numismatiko“ mem. Ĝi venis en la modernajn eŭropajn lingvojn de la latina *numisma* aŭ *nomisma* (genetivus *numismatis/nomismatis*), kiu signifas „monero“. En la helena lingvo la parenca vorto *nomisma* (genetivus *nomismatis*) havis du signifojn. Ĝi estis ĝenerala kutimo, ĉio, kio estas agnoskita kaj establita laŭ kutimo kaj juro, precipe la preskriboj pri mono, mezuro kaj peso. Poste la helena vorto akiris la signifon „monero“, t. e. la kutima mono en iu ŝtato.

Jen la formo de „numismatiko“, en kelkaj etnaj lingvoj.
 Franca — *numismatique*
 Itala — *numismatica*
 Hispana — *numismática*
 Angla — *numismatics*
 Germana — *uNumismatik*
 Nederlanda — *numismatiek*

Rusa, Bulgara, Slovaka, Slovena, Macedona, Hungara — *numizmatika*
 Rimarku, ke en la latinidaj kaj ĝermanaj lingvoj, la *s* de la latina etimo restas en la skriba formo, kvankam la prononco estas tiu de la voĉa „z“ pro la sekva voĉa konsonanto *m*. Male, en la slavaj lingvoj kaj ankaŭ en la hungara, la litero *z* aŭ ties ekvivalento en la kirila alfabeto estas uzata ortografie.

Laŭ Plena Ilustrita Vortaro (PIV, 1970), la ĝusta formo de la vorto en Esperanto estas „numismatiko“, tiel oficialigita en la 2-a „Aldono al la Universala Vortaro“ en 1914. Eĉ antaŭ tiu dato „numismatiko“ estis registrita en la vortaro de Boirac (1909–1910) kaj Verax (1910). Mi trovis tiun formon en ĉiuj Esperantaj vortaroj je mia dispono krom du. „Numismatiko“, literita per „z“, aperas en la bulgara-Esperanta vortaro de Atanasov kaj aliaj sed ne en la alidirekta Esperanta-bulgara de Sarafov kaj aliaj. Ankaŭ en la makedona-Esperanta parto de la vortaro de Galevski kaj Pop-Atanasov troviĝas „numizmatiko“. Estas evidente, ke influo de la gepatra lingvo de la verkintoj de artikoloj ankaŭ en periodaĵoj, ekz. „Kolektanto“, estas la kialo de la misa literado „numizmatiko“.

La sekva problemo estas, kiel nomi la personon, kiu okupiĝas pri la numismatiko? Ĉu li estu „numismatikisto“, nomo formita per la aldono de la sufikso „-ist“ al la radiko „numismatik/“, aŭ ĉu li nomiĝu „numismato“? En tiu ĉi kazo, „numismato“ estas la baza vorto, kaj la nomo de la scienco estas formebla per aldono de la internacia sufikso „-ik“. Komparu kun terminoj en etnolingvoj ne tro helpas, ĉar la formoj estas tre diversaj: angla *numismatist*, germana *Numismatiker*, franca *numismate*, *numismatiste*, itala *numismatico*, hungara *numizmatikus*, kroatiserba *numizmatičar*. Versajne la malpli longa „numismato“ estas preferinda.

La Esperanta-bulgara vortaro registras ankaŭ „numismatografio“, kiu mankas en aliaj Esperantaj vortaroj, kaj ne ĉiuj etnolingvaj vortaroj registras ekvivalenton. La franca *numismatographie* estas difinita kiel priskriba aŭ deskriptiva numismatiko kaj priskribo de moneroj.

Ankoraŭ unu termino bezonas pritrakton, sed bedaŭrinde ĝis nun ĝi mankis. Kiel ni nomu la materialon aŭ objektojn, pri kiuj okupiĝas numismato? Komparu la sekajn vortgrupojn.

epigrafo	fotografio	ŝ	ŝ
epigrafiko	fotografia	ŝilotele	numismatiko
epigrafikisto			numismatikisto
epigrafisto	fotografisto	ŝilotelisto	numismato

Ne estas specifa vorto en la filatelo kaj la numismatiko, kiu respondas al „epigrafo“ kaj „fotografajo“, do la plej facila maniero formi ĝin estas per la aldono de la sufikso „-aj“, analoge kun „fotografajo: „numismatikajo“. Se tiu

formo ŝajnas tro longa, estas eble redukti la nombron de silaboj kaj ricevi la formon „numismaĵo“. „Numismo“ ne povas havi tiun ĝeneralan signifon, ĉar ĝi estas la nomo de helena monero.

Bernard GOLDEN

ALTA REKONO

La 28-an de aprilo ĉi-jare en la Domo de Bulgara-Soveta Amikeco en Plovdiv okazis tuturba E-solenajo kun riĉa belarta programo.

Pri la 100-jara historio de la Internacia Lingvo sur la sojlo de ĝia dua jarcento parolis Jordan Angelov — membro de la Buroo de CE de BEA.

Poste li enmanigis al 28 aktivaj esperantistoj orajn jubileajn medalojn „100 jarojn Esperanto“, inter kiuj estas Ivan Sivarov, Atanas Gaev, Mihail Dančev, Ana

Peĥlivanova, Aleksandăr Plaĉkov, Veselina Kurteva. La plimulto el ili jam pli ol 50 jarojn sindone laboras por Esperanto. Inter la pli junaj estas Fani Mihajlova, ing. Monĉo Monĉev, ing. Bojidar Leonov, Emil Ĉirpanski. Estas distingitaj ankaŭ tri nevidantaj esperantistoj el Plovdiv — Veliĉka Karparova, Vladimir Jelev kaj Danĉo Danĉev.

La distingitaj samideanoj kore dankis al CE de BEA pro la alta ekono de ilia modesta agado.

Vladimir JELEV

SALUTON!

eldono de bulgara esperanto-junularo



LEGU „SALUTON!“

Jam salutas siajn legantojn nova voĉo — la eldono de Bulgara Esperanto-Junularo. En ĝi vi trovos interesajn legaĵojn pri la junulara E-movado enlanda kaj eksterlanda.

La redakcio de „Bulgara Esperantisto“ bondeziras al sia pli juna frato longan vivon. Do salutojn „Saluton“!

NI DEZIRAS INTERSANGI SPERTONI!

Se vi hazarde iras laŭ strato „Tolbuĥin“ en urbo Varna, ĉe la angulo de strato „H. Stamat“ vi nepre vidos sur la muro de malnova konstruaĵo grandliteran surskribon „ESPERANTO“ (esperante kaj bulgare). Tie ĉi troviĝas eta teritorio esperantista — la klubejo de la urba societo „Albatroso“. Se estas jaŭdo, la deköka horo, ni afable invitas vin eniri.

Jam pli ol 3 jarojn de oktobro ĝis la fino de majo ĉi-tie funkcias literatura Esperanto-rondo. Ĝin gvidas la senlaca kaj sperta emerita instruistino Zefira Dimitrova. Ni gerondanoj legas kaj tradukas diversajn mallongajn legaĵojn (fabelojn, fablojn aŭ elektitajn rakontojn el la libro „Postkursaj legaĵoj“ de Violin Oljanov kaj Neno Janev), analizas ilin kaj diskutas. Kelkfoje dum la okupoj ni kantas, trarigardas korespondadojn kaj parolas pri la korespondado. Ofte nia gvidantino proponas al ni traduki ion en Esperanton.

Ekzemple, okaze de la 110-jara datreveno de nia liberigo elsub osmana jugo ŝi petis nin esperantigi la versojn „Rusaj monumentoj“ de Nikola Furnaĝiev.

Ni estas tre kontentaj pri nia laboro en nia literatura rondo. Ni kredas, ke por ni estos utile kontakti kun similaj rondoj kaj intersangi sperton. Do, amikoj, ni atendas viajn leterojn! Bonvolu skribi al: Stefan Apostolov, pl. Lavrentij 37, 9000 Varna, Bulgario.

PRINTEPAJ STREBOJ

Delonge en nia lando majo estas simbolo de nia eterna strebado al scienco, klereco kaj kulturo. Dum tiu monato en la tuta lando oni organizas Majajn tagojn de la kulturo, festivalojn kaj kulturajn festojn.

Do ne estas hazardo, ke en la komenco de majo ĉijare en u. Pleven oni inaŭguris la Esperantan Doman de Kulturo. Ĝiaj taskoj estas tre variaj. Ĉe la Kulturdomo funkcias kelkaj kluboj laŭ profesioj kaj intereso, estos organizitaj amatoraj artaj kolektivoj, oni propagandos la lingvon. Ja tre grave estas por kultura centro esperantista variigi la liberan tempon de sia membraro.

Nur kelkajn tagojn post la inaŭguro de la Kultura Domo okazis koncerto, dediĉita al la Tago de la Venko super la faŝismo. Kiel gastoj de la koncerto ĉeestis multaj reprezentantoj de CE de BEJ.

En la koncerta programo partoprenis la Horo de Sofiaj Esperantistoj sub la direktado de Dora Hristova. Estis plenumitaj la kantoj: „La vojo“, „Al la partio“, „Serenado“, „Super la kamparo“, „Mi ekamis junulinon“, „Bela estas vi, patrujo“. Al la spektantoj speciale plaĉis la plenumo de la solistino Emilija Andonova.

La partopreno de la dommastroj komenciĝis per folkloraj eroj. Centran lokon en la programo okupis la teatraĵeto „Novgeedzoj“ aktoritis esperantistoj-amatoroj kun gvidanto kaj reĝisoro Stefan Aleksandrov. Antaŭ la komenco de la spektaklo li prezentis la rolulojn kaj per kelkaj vortoj rakontis la enhavon de la teatraĵeto „Novgeedzoj“, respegulanta la unuajn familiajn konfliktojn kaj kunpuŝigojn. Malgraŭ ke la esperantistoj-aktoroj el Pleven devas ankoraŭ multe labori por sia teatra perfektigo, ili rolis plezure kaj sincere. Por sia ludo laŭdojn meritas la aktoroj Elena Kalenĝieva, Cvetoljub Kunĉev, Cvetanka Miteva, Dora Pelovska kaj Petja Hristova. Similaj teatraĵetoj estas tre konvenaj en arta programo, ĉar ili ĝenerale variigas la spektaklon. Ni bondeziras al Stefan Aleksandrov kaj liaj kolegoj novajn ideojn kaj atingojn sur la teatra scenejo.

En la festa programo partoprenis ankaŭ la kantistoj Cvetan Lalov kaj Monka Cunova, lernantoj-recitantoj el la teknika lernejo „Mleĉna Promiŝlenost“ kun gvidanto Antoaneta Koĉerska kaj el lernejo „Vapcarov“ kun gvidanto Elena Kalenĝieva.

La Esperanta Kulturdomo en Pleven faris siajn unuajn paŝojn per agrabla arta programo.

Atanas ILKOV

TALENTA E-AGANTO KAJ POETO



Hristo GOROV

EDENO SUR TERO

Ĉu vi konas monton de Orfeo,
kie sorĉis birdojn, bestojn li do?
Kiu serĉis en kaverno kun veo
Eŭridikan, sian beledzinon?

Ĉarme estas tie dum printempo,
suno dum somero vin brunigas,
ĉe aŭtun' plezurigas lakvin sensoj,
dum la vintro neg' okulojn tiklas.

En Rodop' situas Pisanica —
la kursejo de la verdstelanoj.
Tie ĉiu sentas sin feliĉa.
Venu resti nur dum kelkaj tagoj!

Hristo GOROV — 80-JARA

La 18-an de julio ĉi-jare Hristo Gorov festas sian okdekjaran jubileon. Feliĉa aĝo, kiu donas al li eblecon trarigardi kaj analizi sian vivojn tra la jaroj.

Hristo Gorov komencas lerni la Internacian Lingvon en 1924 en urbo Asenovgrad. Tio estas la tempo de lia memklerigo. La junulo soife legas la verkojn de Puŝkin, Dostojevskij, Tolstoj, Lermontov, Gorkij. Tiutempe lian atenton altiras la kreado de la Esperantaj aŭtoroj kaj li konatiĝas kun la verkoj de J. Baghy, K. Kalocsay, E. Miĥalski, N. Hohlov.

En 1928 Hristo Gorov aperigas siajn unuajn Esperanto-tradukojn kaj originalajn verkojn en Esperanto-revuoj kaj fariĝas aktiva kunlaboranto de gazeto „*Esperanto-Praktiko*“. En 1930 li aliĝas al SAT kaj estas unu el la fondintoj de Bulgara Laborista Esperanto-Asocio (BuLEA). La juna Esperanto-verkisto komencas aktive kontribui al la ĵurnaloj „*Sennaciulo*“, „*Nova Epoko*“ k. a. En la sama jaro aperas lia ampleksa poeziaĵo „*Poemo de l'plugisto*“, kiu

realisme kaj emocie respegulas la kontraŭfaŝisman ribelon en Bulgario en septembro 1923.

En 1932 Gorov aliĝas al la Internacio de Proletaj Esperantistoj kaj kunlaboras al revuoj „*Internaciisto*“, „*Sur Posteno*“, „*La Nova Epoko*“. En tiuj revuoj aperas iuj el liaj plej belaj kaj plej revoluciaj poemoj kiel „*Post la fronto*“, „*Fabelo pri l'riviero*“ kaj aliaj. Tiutempe kune kun David Sasonov li tradukas en Esperanton la poemon „*Septembro*“ de Geo Milev kaj tio estas la unua fremdlingva traduko de tiu ĉi talenta verko.

Tamen dum tiu periodo Gorov estas ne nur aktiva verkisto, bona tradukisto, sed ankaŭ senlaca Esperanto-organizanto kaj redaktoro. Dum 1931—1933 en urbo Asenovgrad li redaktas „*Proleta Esperanto-Korespondanto*“ kaj dum 1934—1935 en urbo Plovdiv li estas ĉefredaktoro de la revolucia Esperanto-revuo „*Sturmulo*“. Pro la redaktado de „*Sturmulo*“ li estas arestita kaj kondamnita al trijara severa malliberigo. Post eliro el la malliberejo Hristo Gorov dum 1943—

1944 redaktis la kontraŭfaŝismajn gazetojn „*Patrolanda Voĉo*“ kaj „*Ribelula Batalo*“, kaj per armilo li partoprenas en la kontraŭfaŝisma batalo.

Post la liberigo de nia patrolando el la faŝismo, Hristo Gorov entuziasme eklaboras por la konstruo de la nova vivo en nia patrio. Dum 1948—1950 li estis ĉefredaktoro de la ĵurnalo „*Patrolanda Voĉo*“ en Plovdiv.

Dum la jaroj post la liberigo, Gorov dediĉas sin al aktiva verkado. Oni povas mencii la bulgarlingvajn librojn „*La vojo de la venko*“, „*Montaraj agloj*“, „*Tunelo sub la malliberejo*“ kaj multaj filmscenarojn.

Malgraŭ la ampleksa bulgarlingva verkado, Gorov neniam forlasis la esperantlingvan kreadon. Sub lia plumo aperis poemoj, noveloj, artikoloj, kiuj respegulis la plej aktualajn problemojn de nia nuntempo kaj emociis multajn Esperanto-legantojn.

En 1983 Hungara Esperanto-Asocio eldonis la poemaron „*Ribela Kordo*“, kiu enhavas la plej belajn poemojn de Gorov. En 1986 Bulgara Esperantista Asocio eldonis la libron „*Mia verda pado*“, kiu prezentas lian riĉan prozan verkaron.

Krome Hristo Gorov kompilis kaj redaktis plurajn Esperanto librojn kiel „*Bulgara nuntempa poezio kaj prozo*“, la poemaron de Nikola Vapcarov, la antologion „*Lenin, oktobro, paco*“ k. a.

Dum la periodoj 1960—1964 kaj 1976—1987 Hristo Gorov estis prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio kaj li senlace laboris por la disvastigo de Esperanto en Bulgario kaj por paca interkompreniĝo per Esperanto sur internacia kampo.

Georgi ILIEV

La delegita reto de UEA

La Delegita Reto de UEA estas unika aranĝo. Pri ĝi interesiĝas multaj bulgaraj esperantistoj, precipe novaj, kiuj ne konas detale la agadon de UEA. Pro tio mi penos informi la legantojn de la revuo pri tiu servo ĝenerale, kun aparta atento al ĝia parto funkcia sur la teritorio de Bulgario.

La Delegita Reto de UEA estas tre utila kaj ludas elstaran rolon por la informado pri Esperanto kaj ĝia praktikado. Ĝi havas 2450 funkciulojn, kiuj plenumas 3319 oficojn en 74 landoj. En Bulgario en la reto laboras 54 personoj, kiuj plenumas 64 oficojn. Ili loĝas kaj agas en 24 urboj kaj vilaĝoj.

Delegiteco ne estas honora posteno. Ĝi estas intensa kaj abnegacia por- kaj peresperanta laboro. La kvanto kaj speco de la delegita laboro dependas de tio, ĉu la delegito mem iniciatas laborojn. En kelkaj agadoj delegito estas loka reprezentanto de UEA. Li povas, ekzemple, fojfoje elekti kelkajn novaĵojn el Esperanto-revuoj kaj dissendi ilin al loka nacilingva ĵurnalo aŭ radiostacio. Delegito povas helpi por starigo de kontaktoj inter fakaj socioj esperantlingvaj kaj nacilingvaj.

Kvankam delegito reprezentas UEA en multaj agadoj, li ne rajtas, sen antaŭa interkonsento, en la nomo de UEA fari promesojn pri servoj de oficejoj, funkciuloj, k.a.

Por fariĝi delegito necesas esti individua membro de UEA almenaŭ dum la jaro antaŭ la delegitigo. Oni devas esti bone informita pri la internacia kaj loka Esperanto-movado. Krome la kandidato devas bone posedi la lingvon por dece plenumi sian laboron. Pliajn informojn kaj formularon por respondilo oni povas ricevi de la landa ĉefdelegito.

Ĉiu individua membro de UEA kaj ĉiu membro de landa asocio, se la asocio estas aliĝinta al UEA, rajtas uzi la Delegitan Reton. Oni povas, ekzemple, peti informojn pri turismo, vojaĝado, tekniko, scienco, instruado, industrio, komerco, salajroj; pri aferoj junularaj, studentaj, virinaj, movadaj; pri aliaj movadoj, organizoj ktp. Oni povas peti la delegiton ankaŭ, ekz.: doni konsilon pri solvo de teknika problemoj; rekomendi hotelon aŭ mendi hotelĉambron; traduki *mallongan* leteron al firmao aŭ organizo en la lando de la delegito, ktp.

Oni ne rajtas peti informojn pri la komerca pagokapablo aŭ morala indeco de persono, aŭ similajn konfidencajn informojn.

Krome, delegito de UEA rajtas rifuzi servon, kies plenumon li aŭ ŝi juĝas kontraŭa al sia honoro kaj konscienco, aŭ kiu postulas multan labortempon aŭ specialajn konojn, k. a. Tamen, la delegito devas informi la petinton pri sia malkonsento.

Ĉiam la petinto devas repagi ĉiujn elspezojn, kiujn la delegito faras por plenumi lian peton, eĉ se temas pri tre malgrandaj elspezoj. Se ne eblas sendi respondkuponon aŭ monon el via lando, interkonsentu kun la delegito pri alia maniero de repago, ekz.: per libro, ekzemplero de revuo, malgranda ornamajo k. s., depende de la elspezoj. Anticipa interkonsento pri la repago estas necesa por certigi, ke la delegito akceptas la repagon, kiun vi proponas.

Ĉiu petskribo devas esti akompanata de internacia respondkuponon kaj membromarko de UEA por la kuranta jaro.

Ne estas devo de la delegito renkonti turistojn ĉe stacidomo, akompani ilin, gastigi ilin kaj serĉi korespondamikojn. Fakte multaj delegitoj volonte faras tiajn specialajn servojn. Tiuj delegitoj, kiuj havas sufiĉan tempon kaj deziras fari specialajn servojn, informos vin pri tio.

La Delegita Reto de UEA ludos pli grandan rolon kaj ĝi povas pli bone servi al la monda esperantistaro, donante pli da servoj, se oni observas kaj analizas la delegitan agadon. Tion devas fari la ĉefdelegito. Li devas ĉiujare fari enketon pri la laboro farita de la delegitoj. Dum landaj kongresoj, konferencoj kaj aliaj aranĝoj oni devas organizi specialajn kunsidojn de la delegitoj por ke ili estu instrukciataj, por interŝanĝo de sperto k. s. Tio certe aktivigos iujn ne tre agemajn delegitojn. Se estos konstatite, ke tamen iuj neglektas sian delegitan devon, oni devas ilin forigi el la reto. Mi jam scias pri kelkaj bulgaraj delegitoj, kiuj ne aktivis en la movado kaj eĉ ne vizitas societajn kunvenojn, sed ili ne anoncas sian eksigon el la reto. La ĉefdelegito devas plenumi siajn devojn ne formale. Por renovigi la delegitecon de la nunaj delegitoj laŭ la statuto, post trijara ofico de ĉiuj devas esti petita raporto pri ties agado kaj opinio de socio, en kiu membras la delegito, ĉu valoras, ke li plu estu delegito.

La membromarkfolioj de UEA, sendataj ĉiujare al BEA, devas esti distribuataj inter la socioj, konforme al ties membraro. La societaj membroj devas ricevi ilin por utiligo dum la kuranta jaro. La ricevo de la membromarkoj povas esti plia stimulo por iuj bulgaroj-esperantistoj remembrigi ĉiujare al BEA.

La reorganizo de la asocia laboro kaj agado por atingi de pli grandaj kaj bonaj rezultoj devas tuŝi ankaŭ la bulgaran parton de la Delegita Reto de Universala Esperanto-Asocio.

Nikola NIKOLOV,
fakdelegito pri sporto
kaj turismo, Sofio

EKSKURSETO TRA MIA REMEMORMONDO

Nia ĝisnuna administranto Ĥsen Josifov fariĝis 65-jara.

La redakta skipo dankas al li pro lia sindona kvinjara laboro por la disvastigo de „Bulgara Esperantisto“ kaj elkore bondeziras al li sanon kaj ankoraŭ multajn agrablajn travivaĵojn dank' al Esperanto.

„BE“



OKAZE DE MODESTA 65-JARA VIVOVOJO

Jam antikvaj romianoj trafe rimarkis, ke du taskoj estas plej malfacilaj: skribi vortaron kaj gramatikon. Ni tamen aldonu: ankaŭ aŭtobiografion. La klopodoj de la sinpriskribanto ne ĉiam estas bonsukcesaj: ofte okazas super- aŭ submementaksado, sed ne la necesa laŭdinda modesto verkista sen ajna aspiri al iugrada E-movadana gloreto. Verdire, en nia E-movado mi tute ne elstaras, plejofte ordinaras, ne saĝas, tamen la plennatura aktiva sinteno jam estas saĝo.

Do, nun kara E-amikaro, jen estas mia konciza aŭtobiografio.

Naskiĝinta en v. Kamen, distrikto de Veliko Tŕrnovo, la 23-an de junio 1923, en malriĉa proletigita kamparana familio de gepatroj Ĥristo kaj Dimka, mi finis en mia naskiĝloko sepparan lernadon, kiun daŭrigis en kvara Sofia knaba gimnazio dum 1937-42, soldatservis dum la tempesta, maltrankvila historia periodo 1942-45, partoprenante en la kontraŭfaŝisma Patrolanda Milito en Jugoslavio, Hungario, Aŭstrio.

Dum 1945-50 mi studis en la Sofia Universitato slavan filologion kaj en 1955-60 — rusan filologion, ĉinan, malnovĉinan lingvon kaj literaturon, atinginte legeblecon de ĉ. 3500 ĉinaj hieroglifoj. La rezulto de la lasta okupo estas elĉinigo de ĉ. 20 poemoj bulgaren kaj esperanten.

1939 feliĉas por mi kiel jaro de mia esperantistigo. Tiam mi membris kiel junkomunisto en RMS (elparolu Rems, Laborista Junulara Unuiĝo) kaj, nature, estis abstinenculo. Samjare mi aĉetis ĉe strataj librovendistoj abundantaj ĉirkaŭ mia gimnazio kaj sur bulvardo „Dondukov“ E-lerno- kaj legolibrojn, la seslingvan Fundamentan Vortareton, la Fundamentan Krestomation (Pariza eldono 1924) kaj post kelkmonata aŭtoidakta intensa lernado mi jam ekparolis. Tre baldaŭ mi, deksejarulo-gimnaziano, eniris la nialandan E-movadon kune kun la lernantino Penka Leseva. Ni ofte vizitadis merkrede la kunvenojn de la Sofia E-societo, kies propra vasta klubejo troviĝis en granda konstruaĵo ĉe la strato „Alabin“ n-ro 50, dummilite bomb-detruita. Tie mi konatiĝis kun la sekretario de BEA Belĉo T. Oktomvrijski, kun profesoro Stojan Guĝev, tiama E-parolanto ĉe la mikrofono de Radio Sofia, Ivan Keremidĉiev—Esperov, redaktinto de E-paĝo en ĵurnalo „Zarja“, Georgi Antov, tramkonduktoro, agema esperantisto, kun la tiama studento-juristo Kunĉo Vălev, la E-parolanto ĉe Radio Sofia Kiril Drajev, Nano Nanov, Ĥsen Grigorov, Stefan Ganĉev, Ĥanas D. Ĥanasov (ADA), Petăr Lilkov. Dum la milito ni (Penka kaj mi) estis la plej junaj membroj de la Sofia E-societo kaj estis konataj al ties anaro kiel „la lernanto kaj la lernantino“. Ni ambaŭ tre aktivis, mi ofte deklamis proprajn esperantajn poemojn.

La konstruado de Montodomo „Esperanto“ realiĝis ankaŭ helpe de nia junularo. En la ekkonstruo partoprenis 75 ĝelernantoj kaj 5 instruistoj, gvidataj de mi (8 fotoj, transdonitaj al la Sofia E-Muzeo, rememorigas ĉi-tiun gravan eventon).

Ankaŭ la organiza laboro ne estis fremda al mi. Dufoje mi fariĝis sekretario de la instruista E-societo kaj -klubo ĉe la Centra Instruista Domo (1964, 1983), kie mi sukcese klopodis, ke dum la kunvenoj ĉiu nia ano parolu Esperante. Ne hazarde tiurilate por la ceteraj E-societoj nia anaro rolis kiel vera modelo. Mi multe okupiĝis pri verkado de poemoj en Esperanto kaj pri tradukado. Nun mi havas 340 originalajn poemojn kaj 90 tradukaĵojn. Pli ol 10 bulgaraj popolkantoj pri la heroeca malta popolo, batalinta kontraŭ la turkoj, estis de mi esperantigitaj. Ne nur la Malta televido, radio kaj gazeto, sed ankaŭ nia landa ĵurnalo „Oteĉestven Front“ (p. 8 de 13. 05. 1983), „Heroldo de Esperanto“, (21. 12. 1983) kaj la angla „The Times“ (20.09.1983) menciis pri tio.

Kiam mi parolas pri mia poezio, nature ne estas nepre necese pensi, ke ĉiu verko bonkvalitas.

Krome mi ĝuas 8 poemon dediĉitajn al mi. Ili estas verkitaj de la hungara amiko d-ro János Nagy, d-ro Carmel Mallia, Joseph Zammit (Malto), sinjorinoj Hoffmann (Luksemburgo), Ĉobanu (Rumanio) kaj mia bonega instruanto kaj multestimata olda amiko Simeon M. Simeonov. Ses el la poemoj estas akrostikaj.

Mi ŝatas mencii interalie ankaŭ pri miaj okupoj pri malnovbulgara kaj -rusa lingvoj kaj precipe pri la grandaj bulgaraj kulturagantoj, historiografoj kaj verkistoj de la 18-a jarcento Paisij Ĥilendarski kaj Sofronij Vraĉanski.

Kaj certe interesaj estas miaj gramatikaj okupoj — aparte pri la uzo de la verbaj prepozicioj. Tiu ĉi lingvokampo delonge atendas siajn esplorantojn.

Sajne mi nenion preterlasis. Fine notindas, ke restas konstante brilanta sur mia vivovojo unu belega sento: la amo al nia kara lingvo ESPERANTO!

VIVANTE PLENESPERE

Aŭtoakrostiko

Am-are per krajono malobea
Skribeti pri la vivo ĝismomenta
Enkadre de Movado vigla nia —
Nomiĝas tio peno monumenta

Harmoniigi faron per saĝeco,
Rakonti pri heroaĵar' pasinta,
Impeti per gimnaziana deco,
Skizeti koron Esperante tinta —
Tro kurta ŝajnas mia verslinio;
Ordigi faktojn ne promesas temo:
Versajne rezultigos grandnenio.

Jam tamen solvos sin ĉi-verkproblemo:
Omage al jariĝa mia festo
Silentu vana vantoplena emo;
Incitu trafe vin nobleĉ' — Modesto
Fajranta en intima ena sfero;
Ombrigu saĝo, heroec', impeto,
Verdanta petu sunon Plenespero!

Ĥsen JOSIFOV

Sofia, 5. 5. 1988

ĈETU EN LA LIBROVENDEJO DE BEA!

BELETRO KAJ POEZIO

Apostolo de la libereco. Mercia MacDermott. Prezo: 4, 26 lv.

Antologio Nuntempa poezio kaj prozo. Prezo: 3.74 lv.

Analizo de la interrilatoj inter la blindularo. José Stark Prezo: 2,50 lv.

Burgoj kaj kasteloj. Irena Papirnikova. Prezo: 1.85 lv.

Gardu la pacon. Asen Grigorov. Prezo: 2.40 lv.

La glacikovrita ponto. Ljuben Stanev. Prezo: 2.39 lv.

Esperanto-poetoj de Bulgario. Canko Murgin. Prezo: 0.60 lv.

Rakontoj. Jordan Jovkov. Prezo: 1.85 lv.
Sub la jugo. Ivan Vazov. Prezo: 3.20 lv.

Meze de Eŭropo. Esperantigis: E. Seemannova, O. Knichal, A. Stanura Prezo: 1.40 lv.

Naŭ jarojn en la infero. N. Kemalov. Prezo: 2.40 lv.

La perdita vizaĝo. Jozef Nesvadba. Prezo: 1.40 lv.

Panoramo. Rudolf Hromada. Prezo: 0.80 lv

Riporto skribita en la pendumila maŝo.

Julius Fučík. Prezo: 1.40 lv.

Timur kaj lia taĉmento. Arkadij Gajdar. Prezo: 1.00 lv.

Ukrainaj fabeloj. Nadija Andrianova. Prezo: 1.37 lv.

Poezio. Ĥristo Botev. Prezo: 0.59 lv.

Vilaĝo Borovo. Krum Velkov. Prezo: 0.79 lv.

Ventolume. Debora Baarandi. Prezo: 0.50 lv.

Kantoj de motoroj. Nikola Vapcarov. Prezo: 1.90 lv.

Beletraj eseoj. Georgi Miĥalkov. Prezo: 0.45 lv.

Mistera lumo. Georgi Miĥalkov. Prezo: 2.70 lv.

Vagante tra la mondo maltrankvila. Nadija Andrianova. Prezo: 3.90 lv.

Oklingva nomaro de eŭropaj birdoj. Dr. Mészáros Béla. Prezo: 2.60 lv.

Kiel verki kaj traduki poemojn. Kalman Kalocsay. Prezo: 0.80 lv.

LERNOLIBROJ

Lernolibro por unua grado. Markov, Válev, Sarafov. Prezo: 0.95 lv.

Lernolibro por dua grado. Violin Oljanov. Prezo: 1.40 lv.

Lernolibro por tria grado. Violin Oljanov. Prezo: 0.85 lv.

Ekzercaro por elementa kurso. Neno Janev, Prezo: 0.65 lv.

La tuta Esperanto. Henrih Seppik. Prezo: 1.35 lv.

Malfacilaj momentoj en Esperanto. Violin Oljanov. Prezo: 0.50 lv.

Margene de la lernolibro. Bernard Golden. Prezo: 2.00 lv.

Programoj kaj regularoj por ekzamenoj. Prezo: 0.65 lv.

VORTAROJ

Esperanto-bulgara vortaro, Asen Grigorov, Prezo: 0.60 lv.

Bulgara-Esperanta vortaro. Asen Grigorov. Prezo: 0.70 lv.

GRAMOFONDISKOJ

Jubilea koncerto de Veselin Damjanov. Prezo: 2.30 lv.

Kantas Miŝo Zdravev. Prezo: 0.70 lv.

Ni vivos! Georgi Miĥalkov. Prezo: 2.30 lv.

Poemoj. Ĥristo Gorov. Prezo: 2.30 lv.

REVUOJ

Juna amiko, n-roj 1—4/1987 kaj n-ro 1/1988. Hungara eldono. Prezo: 0.60 lv.

ESPERANTAJOJ

Jubilea marko „100 jarojn Esperanto“. Prezo: 0.13 lv.

Insignoj. Prezo: 0.30 kaj 0.40 lv.

Jubileaj kovertoj. Prezo: 0.08 lv.

Portreto de Zamenhof. Prezo: 0.78 lv.

Slosilteniloj. Prezo: 6.20 lv.

Bildkartoj. Prezo: 0.12 lv.

Afiŝoj. Prezo: 0.32 lv.

Ni povas ekspedi malgrandajn paketojn antaŭpagitajn je la konto de IEK — Stata Sparkaso 3, N-ro 185/5003025. Por pliaj informoj turnu vin al Margarita Atanasova, bul. Ĥr. Botev 97, poŝtkesto 66, tel. 31-00-29.

100 tagojn en Bulgario

DANG DINH DAM,
sekretario de VPEA

(Daŭrigo de n-ro 6/88)

VRACA

Ni forveturis el IEK frumatene la 29-an de majo kun ioma hasto, ĉar nur vespere de la 28-a, pertelefone ni estis informitaj, ke ni devas reveni Sofion, kaj de tie veturi al Vraca, por partopreni la Sepan Konkursan-Recitalon de Boteva kaj Revolucia Poezio en Esperanto je la 30-a de majo.

Tiu serpentume longa vojaĝo estas laciga de la ekiro ĝis la lasta loko, tra stacioj en Smoljan, Plovdiv, Sofio, Vraca. Precipe la vojdistanco de Sofio al Vraca estas memorinda: K-dino Kalinka Vasileva akompanis nin per la aŭto propra de la kantistino Luci, kiu kun ŝia filino ankaŭ estas partoprenantoj en la aranĝo. Survoje la aŭto subite malfunkciigis, dume vesperiĝas kaj pluvas. Kion fari? Poste, helpitaj de alia aŭto, ni revenis la hejmon de Luci. Oni decidis veturi per trajno. Sed la trajno al Vraca ekveturos je la 23-a horo kaj atingos tie je la unua horo nokte. Do, tio estas ne oportuna, riska, ni tranoktis ĉe Kalinka, kaj sekvan frumatemon (la 30-an de

majo), post matenmanĝo, ni iris al Sofia stacidomo kaj pertrajne veturis al Vraca. Ni akurate atingis por la Malfermo de la Sepa Konkursan-Recitalo de Boteva kaj Revolucia Poezio en Esperanto je la 10-a horo.

De pluraj jaroj mi atente legis en „BE“ artikolojn pri tiuj konkursoj-recitaloj, kiuj allogis min tiel, ke antaŭ miaj okuloj kvazaŭ aperas konkursantoj unuope, duope aŭ kolektive aŭdigantaj al mi belajn versojn de Hristo Botev — la „Titano de la bulgara naciliberiga batalo“ — kaj nutris en mi revon iafoje ĉeesti tiun tradician aranĝon, enkadre de la kulturaj festoj „Botev-tagoj“. Pro tio, kiam mi preparis min por mia ĉi-jara restado en Bulgario, mi pensis, ke mia revo estos realigota. Tial mi petis mian amikon, pentriston Hong Hac, doni kontribuon per sia pentraĵo pri tiu heroo, simbolo de batalanto oferinta sian vivon por la homa justo, por libero. Miaflanke, mi pli ofte legis kaj deklamis liajn poemojn en Esperanto kaj en la vjetnama versio.

Do, nia partopreno en tiu aranĝo estas signifoplena, permesanta al ni ĝui kun admiro diversajn trajtojn de talentoj, kiuj per nia kara



Tibor Sekelj

Kumeŭaŭa la filo de la ĝangalo

(Daŭrigo de n-ro 5/88)

ĈIRKAŬ LA BIVAKA FAJRO

Kiam niaj amikoj ekvidis la amason da fiŝoj, grandaj kaj malgrandaj, en nia pi-

rogo, ili aplaudis al la malgranda indiano, por esprimi tiel sian ĝojon kaj ankaŭ sian rekonon al la junulo. Evidente ili estis jam tre malsataj, kiel Kumeŭaŭa antaŭvidis.

Ni tuj aliris al la fajro, pu-

rigis la fiŝojn kaj surpikis ilin sur pintigitajn bastonojn, kiujn la knabo rapide pretigis. Nun mi povis nombri la fiŝojn: ili estis ekzakte dek ses. Kelkaj el ili pezis eĉ kvin kilogramojn. Ni ĉiuj eksidis ĉirkaŭ la fajro kaj regalis nin per la allogaodoro de la rostigitaj fiŝoj. Nenian aperitivon ni bezonis tiun tagon, nek pilolojn por ekhavi apetiton.

Niaj kamaradoj rakontis al ni, ke ili elpensis manieron por altiri la ŝipeton pli proksimen al la bordo kaj ripari ĝin. Sed ili estis senesperaj pro la manko de sufiĉe longa ŝnurego por eltiri la ŝipeton. Mankis proksimume dek metrojn longa ŝnurego. Se tion ili havus, ili povus ligi la ŝnuregon al la pruo de la ŝipeto, pasigi ĝin super fortika branĉo de arbejo sur la riverbordo, kaj ĉiuj tirante kune alproksimigus al la riverbor-

lingvo arte vivigis en la koroj de centoj da ĉeestantoj la heroan vivon kaj noblan faron de unu el la plej estimataj revoluciuloj de nia frata bulgara popolo.

La 1-an de junio mi transdonis al la dommaŝtroj la pentraĵon de mia kolego-pentristo Hong Hac, simbolo de komuna sento vjetnama-bulgara al la genia kaj heroa Hristo Botev, kaj mi havis bonan okazon por dediĉi al ĉiuj mian voĉon pere de lia poemo „Haĝi Dimitro“.

Matene de la 2-a de junio, kune kun Ljubomir Trifonĉovski kaj du hungaraj gejunuloj, ni envidiĝis en la homamasoj pilgrimantaj al la popola mitingo sur la montopinto Okolĉica en la Balkano, kie pereis Hristo Botev, sankta loko por la bulgara popolo.

Ĉio, kion mi propraokule vidas hodiaŭ, montriĝas la vivanta realo pri la senmorteco de Hristo Botev, kies poezio, heroaĵo kaj legenda morto kreas komunan forton kaj kredon al ĉiuj popoloj batalantaj por sendependeco, libero, paco kaj socia progreso. Tiusence, oni ne povas ne admiri la ĉiam pli grandan sukceson de tiu tradicia aranĝo, kiu specigas la viglan lokan E-movadon sur la sojlo de la dua jarcento de Esperanto.

La saman vesperon per trajno ni revenis Sofion. Dum la veturado ni priparolis la eblecojn, ke ankaŭ niaj vjetnamaj gelernantoj deklamu Botevan kaj revolucionan poezion (mi pensas, ke ili nepre bone kaj bele deklamos ĝin!),

kaj revante pri favora futuro, vjetnamaj insanoj povos partopreni kaj kontribui al tiu konkurso plena de internacieco.

La 4-an de junio, je la 15 h., akompanate de redaktoro Veneta Baleva, ni havis renkontiĝon kun k-do Violin Oljanov, ĉefredaktoro de „Paco“, kaj poste kun k-do Donĉo Hitrov, (tiam- Noto de Red.) ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“, en iliaj redaktejoj.

Bonaj kaj utilaj renkontiĝoj, per kiuj ni bone ekkonis la procedon de preparo de ĉiu numero de tiuj renomaj, enhavoriĉaj revuoj. Ni ankaŭ interparolis pri la estonta kunlaboro, pri la daŭra liverado de tiuj esperantaĵoj al la vjetnamaj esperantistoj.

Violin Oljanov ankaŭ estas delonge konata al ni. Krom lia funkcio kiel ĉefredaktoro de „Paco“, li venas al ĉiulandaj esperantistaroj kiel poeto, akademiano de Esperanto. Menciinde, keli estas el la unuaj korespondantoj de nia karmemora Nguyen Van Kinh, eksprezidanto de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio (VPEA), en la fino de la 60-aj jaroj, kaj li mem gastis ĉe ni en junio de 1986. Lia artikolo „En frata Vjetnamio“ publikigita en „Bulgara Esperantisto“, n-ro 9/1986 esprimas, en la nomo de MEM-delegacio kaj de BEA, bonan senton kaj komprenemon al Vjetnamio kaj al la vjetnama E-movado, kiu strebas superi la neeviteblajn malfacilaĵojn de la neevoluinta lando traspertinte dekojn da jaroj de militoj.

do la ŝipon. Tie en malprofunda akvo ili flikus la truon kaj la ŝipeto povus daŭrigi la navigadon.

— Ni havi ŝnuregon. Ni fari ĝin post tagmanĝo, — diris la knabo.

— Kiel? . . . El kio ni faros ŝnuregon? . . . tio estas nebela, — respondis kelkaj.

— Post la manĝo ni ĉiuj kune faros ĝin, — ripetis Kumeŭaŭa.

Kaj kiam ankoraŭ kelkaj esprimis sian dubon, li aldonis:

— Praarbaro havi ĉion, kion homo bezonas. Nur necesas trovi kaj rekonii ĉion.

Bongustega estis la fiŝa tagmanĝo, kaj tiel abunda, ke nur la duonon ni sukcesis

formanĝi. La alian duonon ni enpakis en foliojn por konservi ĝis la vespermanĝo.

Tiam la ŝipestro diris:

— Estas tre bele de tiu ĉi knabo, ke li nutras nin, sed tute certe li deziras por tio esti pagita. . . Diru knabeto, kiom vi postulas por tiuj fiŝoj?

— Homoj en malfacilaĵo, — diris la knabo — Kumeŭaŭa volonte helpi. Monon mi ne bezoni. Arbaro havi ĉion, kion indiano deziras.

Tiu ĉi simpla kaj decida respondo elvokis nian admiron al la knabo. Sed iu aĝa sinjoro diris:

— Mi proponas, ke ni tamen ne restu ŝuldantoj de nia malgranda helpanto, sed ĉiu metu iom da mono laŭ sia bontrovo en tiun ĉi saketon, kaj antaŭ la disiĝo ni transdonos ĝin al la indiano.

Ni ĉiuj akceptis la proponon, kaj la sama sinjoro tuj komencis kunigi la libervolajn pagojn en saketon.

Post la tagmanĝo ankoraŭ iomete ni sidis kaj interparolis. Subite la ŝipestro diris:

— Indiana knabeto vi diris ke vi povas al ni havigi ŝnuregon.

— Sed mi montri al vi kie. Venu kun mi.

Kumeŭaŭa leviĝis kaj ekiris tra la ĝangalo. Tuta procesio de scivolemuloj akompanis lin, kun la ŝipestro antaŭe.

Je apenaŭ kvindeko da metroj de la fajro li haltis antaŭ malalta, apenaŭ rimarkebla palma arbusto, kun longaj pintaj folioj en formo de ventumilo. Li faldrompis unu tian folion inter la fingroj kaj el la rompita loko li eltiris dekon da maldikaj fadenetoj.

— Jen la ŝnurego, kiun vi bezonas.

Pro tio mi tre dankas lin kaj pensas, ke se „Zefiro“ aperis kaj donis vivoforto al la Esperantista Societo „Albatroso“ en Varna en ĝia kriza momento (1936), do hodiaŭ „Zefiro“ ankaŭ blovas novan kaj mildan venton al sia „Amiko“ tre malproksima, sed fidinda.

K-don Donĉo Hitrov mi konis kiel ĵurnaliston pere de lia longa kaj interesa artikolo „Someraĵ porinstruistaj E-kursoj en Bulgario“, publikigita en „Bulgara Esperantisto“ n-ro 10/1971, kaj poste kiel prezidanton de Internacia Ligo de Esperantistaj Foto-Kino-Magnetofon-Amatoroj (ILEF), kaj hodiaŭ, unuan fojon, mi havas feliĉon persone renkontiĝi kun li en la Redaktejo de unu el la plej malnovaj revuoj en la mondo (1919), de la unua E-revuo malavare liverata de BEA al VPEA dum 30 jaroj.

Ni estis tre kontentaj pri tiu amika renkontiĝo, en kiu ni preparolis kaj la pli oftan kunlaboron kaj la akuratan liveradon de la ŝatata revuo al la vjetnama legantaro.

GABROVO

Vespere la 8-an de junio, la trajno veturis nin al Gabrovo, urbo de la 25-a Kongreso

1 Pseŭdonimo de Violin Oljanov

Sed la ŝipestro ne havis ŝer-ceman humoron:

— Sajnas ke tiu knabaĉo volas primoki nin, — li diris malbonhumore.

— Ne. Kumeaŭaŭa ne primoki. Multaj tiaj fadenetoj kune estas ŝnurego. Multaj mallongaj ŝnuregoj kune fariĝi longa ŝnurego. Rigardu!

Dum li tion ĉi diris, li kuŝigis la fadenojn sur sian femuron, kaj tenante ilian finajon per unu mano, per la alia li rulis la fadenojn tiel, ke ili interplektiĝis en maldikan, sed tre fortan ŝnuron. Tuj poste per lertaj movoj eltiris fadenojn el du aliaj folioj, kunrulis ilin. Poste per simila procedo, inter la femuro kaj la manplato li interplektis la tri ŝnurojn en pli dikan kaj fortikan ŝnuron. Li donis ĝin al la ŝipestro dirante:

— Dissiri ĝin, se povi.

Nek li, nek la aliaj povis

dissiri ĝin.

— Bone, — diris la ŝipestro — sed por plekti dekmTRAN ŝnuregon tiel ni bezonus tutan monaton. Tio estas neebla.

— Se ni ĉiuj labori, antaŭ noktigo ŝnurego preta.

— Mi ne kredas, sed tamen ni provu, — diris la ŝipestro dubeme.

— Bone, ĉiuj iri serĉi tian malgrandan palmon, kaj klopodi el ili eltiri fadenojn. Fadenoj esti longaj. Kiu ne sukcesu, voku min por montri.

Ni ĉiuj disiris en la ĉirkaŭaĵo. Kelkaj tuj sukcesis eltiri fadenojn, dum aliaj eĉ ne rekonis la folion, kaj bezonis la helpon de la knabo. Sed post lia instruo unu post la alia, ĉiuj triumfe montradis manplenon da preskaŭ nevideblaj fadenoj.

— Unu el vi kunigi la fadenojn, kaj porti ilin al mi. Kumeaŭaŭa plekti.

Post momento komencis al-

de bulgaraj esperantistoj en julio 1938, urbo ĉiam brilanta sub la lumo de pli ol 70-jara „Verda Torĉo“, kiu liveris al la landa kaj internacia E-movado plurajn meritajn aktivulojn, inter kiuj estas Kunĉo Vălev, eksa ĝenerala sekretario de BEA kaj Dimitro Haĝiev, nun prezidanto de MEM-sekcio ĉe BEA.

Ĉi-foje nia akompananto estas k-dino Stefka Ĉenkova, ĉarma kaj gaja instruistino de Esperanto, kiu bone prizorgis nin, dividis kun ni ĝojon kaj interesojn dum la kvar tagoj en Gabrovo kaj en Botevgrad.

Bonvenigis nin ĉe la stacidomo en malfrua vespero (23-a h) la verda familio de Dimitro Tiĥov, kies filino estas Sonja Tiĥova, E-instruistino, mia korespondantino de 1981, kaj ŝino Bojana Prodanova.

En la hejmo de Sonja, post la emocia interkonatiĝo, oni proponis al ni bonan manĝon laŭ gabrova maniero. Tio estas por ni la unua vere familia etoso, kiu aldone pravas la famon pri gastamo de la bulgara popolo. Kvankam tre malfrue, Sonja kaj ŝiaj gepatroj, maljunaj esperantistoj, senhezite piediris konduki nin al nia loĝĉambro. Kiel mirinde bela estis tiu mallonga ekskurso, dum kiu gastoj kaj gastigantoj kun granda ĝojo kaj plezuro interparolis kaj ridis sur dekliva kaj serpentuma vojo sub

venadi al li la kunigita amaso da fadenoj. Li eksidis sur falintan trunkon kaj inter la nuda femuro kaj la manplato komencis krei longan ŝnuron, kunigante la multajn fadenojn en unusolan.

Iu junulo longe lin observis, kaj poste diris iom timeme:

— Sajnas al mi ke ankaŭ mi povus tion fari.

— Certe vi povi, — respondis la indiano. — Sidi kaj provi. Ne esti malfacile!

La unua peco estis plena de nodoj. Sed la dua jam fariĝis pli bona, kaj la trian oni ne povis distingi de tiu, kiun Kumeaŭaŭa ĵus faris. Nun jam ili du kune plektadis la ŝnurojn, kaj baldaŭ ankaŭ tria aliĝis kaj lernis la „metlon“. La laboro de la triopo ĝuste sufiĉis por prilabori la tutan kvanton da fadenoj, kiuj estis konstante alportataj.

Dum tri horoj daŭris la la-

diversaj arbo-foliaĵoj tralumataj de brilantaj elektrolampoj.

La 9-an de junio, ni vizitis la Nacian Muzeon „Aprilov“ kaj la Etnografian Parko-Muzeon „Etar“. En tiu unika subĉiela parko-muzeo, krom ĝuado de la bela naturo, kontemplo de koketaj domoj, en kiuj la metiaj specialistoj produktas kaj proponas al la vizitantoj diversajn tradiciajn objektojn, ni havis la bonŝancon renkontiĝi kun Danail Ivanov, fama transilistilo kaj fervora esperantisto. Li rezervis sian apartan komplezon por ni, la unuaj vjetnamaj esperantistoj, kiujn li akceptis en tiu konata ligna restoracio, kie sur la sama tablo sidis pluraj eksterlandaj esperantistoj, inter kiuj estis s-ro Humphrey Tonkin, prezidanto de UEA. Bona kafo, interesa rakonto, tranĉeto-donaco proponita al ni restas por ĉiam kiel memoraĵo de la ordinara membro de la loka E-societo.

Matene, la 10-an de junio, ni vizitis la Domo de Humuro kaj Satiro, fame konata kiel unika trezorejo de humuraj kaj satiraj verkoj — ŝercoj, anekdotoj, versaĵoj, pentraĵoj. . . Se rido alportas bonan sanon, do, tie ĉi nia sano pliboniĝas pro abundo da ridegoj! Por mi tiu Domo delonge estis konata pere de „BE“, kies artikolon mi sisteme tradukis en la vjetnaman lingvon kaj publikigis en la revuo „Literaturo kaj Arto“. Hodiaŭ, antaŭ la

impona konstruaĵo plena de humur-satiraj artaĵoj bulgaraj kaj eksterlandaj, mi sentas min kaj fiera kaj iom humila pro manko de kontribuo de tiuspeca artaĵo el nia lando. Sed, kion fari?

La saman tagon, la solena jubileo de Centjara Esperanto estis organizita en la urba teatro je la 18-a h, far DE de BEA en Gabrovo. Partoprenis pli ol 300 lokaj esperantistoj, ni du vjetnamoj kaj Stefka Ĉenkova kiel reprezentantino de CE de BEA.

Ni ankaŭ havis la honoron, kiel gastoj, esti en la prezidantaro kaj en la nomo de vjetnamaj esperantistoj salutparoli al la ĉeestantoj.

Mia parolo mencias, ke:

La vera amikeco de BEA kaj VPEA dum 30 jaroj donis al ni fortajn flugilojn por atingi plurajn ŝatatajn urbojn de Bulgario okaze de la Centjariĝo de Esperanto kaj la 80-a Jubileo de fondiĝo de BEA. De Hanojo trans Moskvon al Sofio, kaj de Sofio ni jam alvenis laŭvice la urbojn Plovdiv, Smoljan (IEK-Pisanica), Vraca kaj nun Gabrovo. . .

Mi volis veni Gabrovon, ĉar ĝi famas pro ĝia unika arango — Tagoj de Humuro kaj Satiro, ĉar tie mi havas multjaran korespondan-

boro, dum kiu tempo kvazaŭ en vetkurado, ĉiu klopodis laŭeble plej multe kontribui al la komuna celo. La entuziasmo estis tre granda. La nekredemo malaperis. Subite la knabo ekkriis:

— Sufiĉe! Ne bezoni pli el-tiri fadenojn.

Li havis antaŭ si naŭ ŝnurojn dikajn kiel krajono, kaj ĉiu el ili estis longa dudek metrojn. Nun li komencis, helpate de la du junuloj, interplekti la ŝnurojn. Tre baldaŭ pretiĝis ŝnurego egale dika kiel la ŝipa ŝnurego, al kiu oni devis tiun ĉi aldoni. Nur anstataŭ dek metroj ili faris dudek, do eĉ pli ol estis bezonate.

Generala ĝojego ekregis, kiam la ŝipestro deklaris, ke la ŝnurego estas pli forta ol kiu ajn alia kiun li konis, kaj ke helpe de ĝi certe ili sukcesos eltiri la ŝipeton en la daŭro de la morgaŭa tago. Ĉiuj nun

eĉ kun pli granda estimo rigardis al la eta indiano.

Vesperigis intertempe. Ni ĉiuj eksidis ĉirkaŭ la fajro por ripozi. Iu sinjorino longe observis la bronzkoloran knabon, kaj subite demandis:

— Diru al mi, knabeto, kion signifas tiuj du nigraj rondoj sur viaj vangoj?

— Per tiuj tatuataj rondoj sur la vangoj oni signalas en mia tribo la plenagulojn.

Mi sciis, ke tiu klarigo ne estas kompleta. Tial mi petis la knabon rakonti al ni, kiel li ricevis tiujn signojn.

— En la tribo Karaja ĉiu knabo kaj knabino senpacience atendi la tempon por rajti ricevi tiujn rondetojn. Ilia nomo „omaruro“ — komencis Kumeŭaŭa sian rakonton.

— Nur havante tiun signon, la knabo fariĝi vera membro de la tribo. Tiam li povu iri ĉasi kun aliaj indianoj, partopreni kunvenojn kaj dancojn,

prepari sin por esti sorĉisto kaj, se trovi bonan knabinon, peti ŝin por edzino. Same la knabino, nur kiam ŝi ricevi „omaruro“, esti virino, povi labori kaj amuzi sin kun aliaj kaj edziniĝi.

Sed ne esti facile ricevi la nigrajn rondetojn. Ne sufiĉi la aĝo. Unue necese lerni memstare vivi meze de la prarabaro, sen ia ajn helpo de aliaj.

Ĉe ni knabo de la unuaj jaroj de la vivo komenci lerni klopodi koni la naturon en ĝiaj diversaj formoj. Ekde la kvina jaro infano lerni pafi per sago, kiel ĉe vi blankuloj komenci skribi kaj legi. Por ni tiel grave pafi, kiel ĉe vi koni la literojn. Tiam mia patro por mi fari malgrandan pafarkon. Du jarojn poste, mi jam sola fari pafarkon kaj sagojn. Poste lerni eltiri fadenojn kaj fari ŝnuron por pafarko.

tinon, Sonja Tihova, kiu sendis al mi valorajn esperantaĵojn, inter kiuj estas la libro „Mia vivo“ de Trifon Hristovski, tiel emocia, ke mi kaptis tujan ideon traduki ĝin en la vjetnaman lingvon. Krome, ĉi tie mi havas la okazon renkontiĝi kun mia amikino-instruistino Stefka Toteva, prezidantino de la Esperantista Societo ĉe la loka Panuzino, kiu lernigis kaj sindone helpis por kvar vjetnamaj laborantoj en tiu urbo perfektigi la Internacian lingvon en IEK-Pisanica. Mi pensas, ke tio estas modelo kaj efika helpo al la E-movado en Vjetnamio. Fine, por esprimi mian sinceran dankon al niaj gastigantoj, kaj al la ĉeestantoj, mi preferas dediĉi al ili vjetnaman popolkanton en Esperanto. Kaj feliĉe por mi — sekvas aplaŭdoj!

La adiaŭa vespero ĉiam estas memorinda. Ĉe manĝotablo abunda je bongustaĵoj, ni havas tempon libere interparoli kun inĝ. Ivan Petrov, s-ino Julieta Meteva, s-ano Mitko Conev, ktp. Iliaj donacoj simbolantaj la karakteron de gabrovanoj kun ĉefaj trajtoj — ŝparemo kaj kalkulemo, estas tre valoroj por ni.

Matene de la 11-a de junio ni forveturis al Botevgrad kun bedaŭro, ke pro tempomanko ni ne povis revidi mian amikinson Stefka Toteva, kies afablaj edzo, filino kaj ŝia vjetnama lernanto bonvenigis nin post la solenaĵo



La aŭtoro-Dang Dinh Dam (la sesa de maldekstre), en la vjetnama ambasadejo dum ceremonio por distingo de Nikola Aleksiev (en la mezo en okulvitroj) per ŝtata vjetnama ordeno „Amikeco“.

kun espero, ke ni havos amikan renkontiĝon ĉe ŝi. Tamen mia koro ankoraŭ kovas esperon revidi ilin ie aliffoje.

(Daŭrigo en n-ro 10/88)

En tiu tempo Kumeŭaŭa jam akompani la pli aĝajn dum fiŝkaptado. Ankaŭ ĉasi kelkfoje, sed malofte mi trafi beston aŭ fiŝon. Pli aĝaj neniam ridi pri mi. Ĉiam kuraĝigi kaj kelkfoje ĉasisto stari malantaŭ mi por mortigi la beston, se mi maltrafi.

Unu tagon la tribestro ordoni al mi, ke mi ekbruligu fajron per sekaj branĉetoj. Post longa kaj pena frotado, fine mi sukcesis. Kumeŭaŭa povu naĝi kiel malgranda infano, same kiel ĉiuj kamaradoj. La pli aĝaj kelkfoje intence renversi pirogon, por devigi nin naĝi. Kiam mia patro konstruis pirogon, Kumeŭaŭa multe helpi lin. Tio bona lernejo por mi.

Antaŭ unu jaro la maljunuloj de la tribo kredi min sufiĉe lerta por eniri la grupon de dek junuloj de 12 ĝis 15 jaraĝaj, kun kiuj mi dum tuta jaro ekskursi, ĉasi, fiŝkapti kaj multe vojaĝi tra riveroj

kaj praarbaroj. Ĉiam akompani nin granda ĉasisto Teŭoro. Li instrui nin ĉion kion knaboj ne scii. Tiu jaro esti plena de aventuroj, agrablaj kaj mala-grablaj.

Lasta monato en arbaro knaboj estis solaj. Sen instruisto. Ni pentris korpojn nigraj kaj harojn mallonge tranĉis, por esti ridindaj kaj ne alproksimiĝi al vilaĝoj.

Kiam ni sanaj revenis, knaboj devis fari grandan ekzamenon por montri rezulton de lernado. Tribestro Ŭatau montri al ni piedsignojn de diversaj bestoj kaj demandi kiu besto kiam tie pasis. Ankaŭ devi sekvi kaj ĉasi bestojn laŭ piedsignoj. Konkurso de naĝado sekvi kaj ni kune rapide devi konstrui dometon. La tuta tribo observi nin.

Fine ĉiuj vidis, ke ni estas pretaj por esti plenaĝuloj. Tiam komenci la ĉefa ceremonio. Maljuna sorĉisto Oarete bruligi rondan malfermon de

sia pipo kaj premi ĝin forte sur mian vangon. Kiam pipo tuŝi vangon, karno ekbruli. Tiam teruran doloron mi sentis, ke larmoj de la okuloj fluis. Kumeŭaŭa forte premi la pugnojn, tiel ke ungoj vundi la manojn. Mi volis kriegi per fortega voĉo, sed ne rajtis eĉ vorton diri. Granda honto vekii por knabo, kiu volas fariĝi vera ĉasisto plenaĝa.

Poste nigran farbon enmetis sorĉisto en la rondetojn sur la vangoj kaj ili resti tie por ĉiam. Mi rigardis mian amikojn. Iliaj vizaĝoj palaj pro sufero, sed brilaj pro feliĉo. Estis plej granda tago en mia vivo.

Kumeŭaŭa eksilentis. Ankaŭ ni ĉiuj silente meditis pri la lernejo de la praarbaroj, pri kiu la knabo al ni ĵus rakontis. Neniu plu deziris primoki la indianeton por la nigraj rondetoj sur lia vizaĝo. Nia estimo al li refoje kreskis.

LA KORESPONDADO EN MIA VIVO

La lernado de fremdaj lingvoj estas mia ŝatata okupo. Pli kaj pli enprofundiĝante en lingvolernadon, mi povas fari komparojn el gramatika kaj estetika vidpunkto, konstati la transiron de unu grado de la lingva posedo al alia, pli alta. Tio fine donas la plezuron legi memstare alinaciajn librojn, gazetojn aŭ subteni senĝenan konversacion kun alilandanoj.

Antaŭ pli ol 20 jaroj kun vera scivolemo mi aĉetis Esperanto-lernolibron. Pri Esperanto mi jam sciis de mia koleĝino-esperantistino kaj tuj mi ekuzis miajn liberajn horojn por kapti la teorion de tiu lingvo pli rapide. Mi lernis sola. Sufiĉis kelkaj semajnoj kaj la enhavo de la lernolibro ne plu estis problemo por mi. Kuraĝe mi komencis korespondadon, proponante mian amikecon. Por la nova 1967 jaro mi sendis novjarajn bondezirojn al pli ol 10 eksterlandaj esperantistoj kaj post unu monato mi ricevis respondon de ĉiuj. La korespondado plivigliĝis, la nombro de miaj leteramikoj kreskis. Preskaŭ ĉiutage venis leteroj por mi en mia hejmo. En 1967 mi havis la feliĉon partopreni internacian fervojistan Esperanto-aranĝon en Finnlando kie mi renkontis esperantistojn el diversaj landoj. Mi hejmenrevenis pliriĉigita per travivaĵoj, impresoj, personaj kontaktoj. Novaj adresoj eniris mian adresaron. Sekvis jaroj, dum kiuj mia vivo fariĝis pli interesa, pli enhavoriĉa. Kiel fervojistino mi rajtas vojaĝi eksterlanden senpage. Do ĉiujare mi vojaĝis por partopreni Esperanto-kongresojn aŭ aliajn E-aranĝojn, landajn renkontiĝojn, feriosemajnojn. Dank' al Esperanto mi konatiĝis kun la kutimoj kaj la vivo de diversaj popoloj, ĝuis la riĉecon de muzeoj, naciaj festoj, kantoj, naturbelaj. Konversacioj, diverstemaj diskutoj estis por mi plezuro!

Nun la nombro de miaj leteramikoj estas sufiĉe granda (pli ol 300) kaj mi ĝojas, ke ĝis nun, dum 20 jaroj, mi perdis eĉ ne unu el miaj korespondantoj. Interŝanĝo de bildkartoĵoj, libroj, salutoj kun bondeziroj garantiis reciproke ĝojajn impresojn. La legado de multpaĝaj leteroj helpis al mi pli bone lerni la lingvon kaj ĉiam trovi ion novan, nekonatan rilate la gramatikon aŭ la esprimmanieron. Ĉiu ricevita letero, skribita en perfekta altnivela stilo, estas por mi eta leciono. Fakte mi atingis la kapablon interparoli tute libere dank' al tio, ke tre ofte mi havis kiel kunparolantojn ankaŭ kiel korespondantojn ege spertajn esperantistojn. En la komenco iuj geamikoj korektis miajn leterojn kaj resendis ilin al mi. En konversaciaj rondoj ni pridiskutadis gramatikajn kaj lingvajn temojn. Mi gardas ĉiujn ricevitaĵojn leterojn — ili estas trezoro por mi.

Por pliperfektigi pri la lingvo, mi legas literaturajn kaj fakajn Esperanto-revuojn, bultenojn el diversaj landoj. Mi serĉas tra la linioj novaĵoj, informojn kaj ŝatas sendi salutkartojn al anoncitaĵ letervesperoj, landaj kongresoj, grupaj kaj societaj aranĝoj. Tre ofte mi donas atenton al iu pli interesa korespondpropono kaj tiel mi gajnas novan leteramikon.

Alia bona ebleco por provi kaj pruvi la nivelon de nia lingva kapablo estas la diversaj konkursoj, organizataj enkadre de la Esperanto-movado. Partoprenante iujn el ili, mi sukcesis gajni premiojn — ekz. en kon-

kursoj en Italio, Hispanio („Floraj ludoj“), en konkursoj de Monda Turismo (3 fojojn) ktp. Alloga okupo por mi fariĝis la tradukado. Mi kunlaboras al Esperanto-revuoj per etaj artikoloj kaj tiu laboro feliĉigas min!

Dank' de Esperanto en mi vekigis amo al la filatelo. Multaj miaj leteramikoj kompletigis siajn filatelajn albumojn per bulgaraj poŝtmarkoj sendataj al ili de mi. Ili ricevis donace la eldonitan en nia lando jubilean Esperanto-poŝtmarkon. Reciproke mi sukcesis havigi al mi preskaŭ ĉiujn filatelaĵojn emisiitajn en aliaj landoj omaĝe al la centjara jubileo de Esperanto.

La homa spirito estas maltrankvila. Ĉiu homo volas ricevi de la vivo ion novan, serĉas eblecon manifestiĝi en iu sfero. Unu el la manieroj valorigi kaj sencigi sian ekziston, esti pli utila al la socio, estas Esperanto. Grava kondiĉo por plene fruktodona aplikado kaj uzado estas ĝia bona posedo. La korespondado estas fakte la praktika uzado de Esperanto, ĝi kunligas la homojn, feliĉigas ilin.

Pere de Esperanto mi povis ekkoni amikecon. Mi ne nur serĉis, sed ankaŭ proponis, subtenis ĝin. Mi proponis amikecon tian, kiam mi mem bezonas — sen mensogoj, sen malsincereco. La ricevita letero estas pruvo, ke iu fora amiko pensas pri mi, dediĉis tempon por esti perletere kun mi, dividi okazintaĵojn el sia vivo, interŝanĝi pensojn, travivaĵojn. Ĉiun mian korespondanton mi taksas kiel mian instruiston, ĉiun leterligon — kiel fonton de pliaj konoj kaj scioj. Mi bone konas la ĝojon post ricevo de amika letero, la sentojn, kiujn naskas sinceraj vortoj! Tre ofte ordinara bildkarto kun kelkaj salutlinioj faras mian tagon pli interesa, pli feliĉa!

Esperanto estas posedaĵo de ĉiuj homoj. Mi serĉas kontaktojn kun personoj, al kiuj estas karaj ĝiaj idealoj. Veturante tra la mondvojoj, kun la verda flago de la espero, mi ekzamenis kaj hardis en mi la senton „patriotismo“. Fiero plenigas min, kiam mi konatiĝas kun alilandanoj jam vizitintaj Bulgarijon, nian etan terangulon! Multaj konas nian landon kaj ankoraŭ multaj revas vidi ĝin.

En multaj leteroj mi legas bonajn, afablajn vortojn pri „Bulgara Esperantisto“. En aliaj oni admiras la aktivecon de nia landa Esperanto-movado, oni citas nomojn de fame konataj bulgaraj esperantistoj, la titolojn de Esperanto-libroj, eldonitaj en Bulgario.

Ne estas eble prezenti en unu artikolo la riĉan enhavon de la leteroj, kiujn mi ricevadas dum 20 jaroj el pli ol 30 landoj, la pensojn, la opiniojn de ĉiuj tiuj modestaj homoj. Mi ne scias la ĝustan nombron de la ĝis nun ricevitaĵoj de mi leteroj — mi kredas, ke ili estas miloj! Miloj da blankaj kolomboj de amikeco, fideleco, sincereco! Ili instigas min daŭre okupiĝi pri Esperanto, por ne perdi la kontaktojn kun la mondo, por ĝui veran amikecon, por ke estu mia vivo pli sen-coplena!

Lilija KOLEVA,
Sofio
bul. „Cvjetko Radojnov“ 10,
bl. 2, vh. 2, ap. 34

Estis julia mateno. Trajno venanta el Sovet-Unio, tra Rumanio, haltis ĉe fervojstacio Kaspiĉan en nord-orienta Bulgario. En la varvagonoj troviĝis centoj da sovetaj infanoj, forprenitaj perforte de iliaj gepatroj post la invado de la hitlerfaŝistoj en tiun landon.

Sur la perono promenis pasaĝeroj, atendantaj trajnojn en diversaj direktoj. La germanaj varvagonoj tuj altiris ĉies atenton. En ĉiu vagono troviĝis kelkdeko da infanoj en aĝo de ok ĝis dekdu jaroj, gardataj de soldato armita per aŭtomatpafilo. La kompatindaj infanoj premis sin unu al la alia kaj gapis eksteren. Iuj etuloj plorĝemis: „Panjo, kara panjo, venu min preni. . .“

Rigardante la teruran bildon, maljuna vilaĝanino krucsignis kaj flustris al siaj du nepoj: „Kálvaria estas ilia vojo, infanoj. Kiu scias, kio ilin atendas en la malproksima lando. . .“ Dirinte tion, ŝi kaptis la manojn de siaj nepoj kaj rapidis for, timante ke oni povus forrabi ankaŭ ŝiajn karulojn. . .

BRAVULO

La pordoj de la vagonoj estis larĝe malfermitaj kaj la pasaĝeroj rigardis internen, kie sidis infanoj palvizagaĵ kun distaŭzitaj helaj haroj, bluokulaj. Sur iliaj vangoj videblis sekigintaj larmoj. En la vagono estis ankaŭ junulino kun longa blonda hararo. Si rigardis al la pasaĝeroj kvazaŭ serĉante konatan vizaĝon. Kun malgaja karesa rideto ŝi rigardis la infanoj, kiuj premis sin al ŝi, serĉante konsolon.

Subite la junulino premis per ambaŭ manoj sian kapon kaj konvulsianta falis sur la plankon. La infanoj timigite retiriĝis, ne sciante kiel helpi al ŝi.

La gardosoldato demetis la rimenvipon pendantan ĉe lia zono kaj senkomplete ekvapis la svenintan knabinon. Vidante tiun kruelan konduton de la faŝista soldato, la publiko protestis.

La soldato ĉesis vipi la knabinon, jetis malican rigardon al la pasaĝeroj kaj minacis ilin per la fusilo.

— For de la perono, aŭ mi pafos! — kriis li en sia lingvo, tremante pro ekscitiĝo.

Apud la vagono, kun sako sur la ŝultro, staris Ivan la Dobruĝano — altstatura, larĝŝultra kamparano kun grandegaj kruoj kaj brakoj, vera giganto.

Dum la terura incidento onklo Ivan proksimiĝis al la vagono kaj observis kolere kaj kompateme. La malfeliĉa junulino komencis iom moviĝi. Sia buŝo estis plena je sango. Si malfermis la okulojn kaj ŝia rigardo falis sur tiun ĉi strangan homon kun kompatema rigardo. La gardosoldato ankaŭ rimarkis onklon Ivan kaj rigardis lin mirigite, eĉ kun iom da timo, ĉar li verŝajne unuafoje vidis tian neordinaran homfiguron. Onklo Ivan rigardis la germanon rekte en la okulojn, li kvazaŭ paralizis tiun ĉi fihomon. Li ne povis sin deteni fulmrapide eniris la vagonon kaj proksimiĝinte al la soldato, per pugno faligis lin senkonscia sur la plankon. Poste li karesis kaj trankviligis per kelkaj vortoj la junulinon kaj, adresante sin al la infanoj, li diris en ia stranga rusa-bulgara lingvo, ke lia nomo estas Ivan kaj demandis ĉu inter ili estas iu kun la sama nomo. Evidentiĝis, ke unu el la infanoj havas la saman nomon.

— Mi ne povas liberigi vin ĉiujn, sed almenaŭ unu el vi mi provos savi — mian samnomulon Ivanĉjo. . . La germanoj kondukos vin al Germanio, sed vi ne perdu la esperon. La Ruĝa Armeo liberigos vin!

Tion dirinte, onklo Ivan mansvingis al la knabeto proksimiĝi, kaptis lin kaj, kaŝinte lin sub sia larĝa kapoto, saltis sur la peronon, rapide malproksimiĝis for de la stacio kaj baldaŭ kaŝis sin en la densa arbustaro apud vilaĝo Kaspiĉan. Li lasis la infanon kuŝi inter la arbustoj, demetis la sakon kaj donis panpecon al la malsata hometo.

— Manĝu trankvile, Ivanĉjo. La trajno baldaŭ daŭrigos sian vojon al Germanio.

Vespere, kiam ekbrilis la steloj, Onklo Ivan forlasis sian kaŝejon kaj ekiris kune kun la infano al sia domo en vilaĝo Kaspiĉan. Liaj infanoj, Steĉjo kaj Peĉjo akceptis afable la savitan knabeton. La edzino Gina regalis lin per kuko kaj aliaj frandaĵoj. Poste oni banis kaj pure vestis lin.

Onklo Ivan amis Rusion kaj la rusan popolon, kiu gvidita de la famaj generaloj Skobelev, Gurko, Tottleben kaj multaj aliaj, liberigis Bulgariion el la barbara osmana jugo. „Rusio, Rusio — li pensis — vi savis Bulgariion, sed mi povis savi nur unu rusan infanon“.

Estante ĉiam kun la filoj de onklo Ivan, Ivanĉjo rapide fariĝis lernanto. Li estis diligenta kaj laborema knabo kaj dum la libera tempo helpis al onklo Ivan, paŝtis ties ŝafojn kaj bubalojn.

Onklo Ivan kaj lia edzino rilatis egale al la tri infanoj, sed ili sentis, ke Ivanĉjo nostalgias pri sia patrolando. Multfoje ili pridemandis lin kie li naskiĝis, sed li pro la travivita teruro estis forgesinta la nomon de sia vilaĝo. Li nur memoris, ke proksime de lia vilaĝo fluas granda rivero. . .

Pasis tri jaroj. Iun septembran tagon en 1944 oni eksciis, ke la sovetaj tankoj transiris Danubon kaj proksimiĝas al Kaspican. La tuta vilaĝo eliris renkonti la sovetajn soldatojn. Ivanĉjo, jam junulo, premis al sia brusto grandan bukedon de ruĝaj floroj. La gvidanta tanko haltis en la centro de la placo kaj el ĝi eliris leŭtenanto. Ivanĉjo jetis sin al lia kolo kaj flustris ruslingve.

— Kamarado, prenu min kun vi. Mi estas ruso. . .

La ofiĉiro kisis la infanon sur la vangoj kaj mirigite demandis la proksime starantan onklon Ivan:

— De kie venis ĉi tiu knabo?

— Viaj prapatroj savis nian landon elsub la osmana jugo, sed bedaŭrinde mi povis savi nur unu infanon, kiam la germana trajno kun rusaj infanoj pasis preter nia vilaĝo.

— Dankon! Dankon, fratol — respondis la ofiĉiro kaj brakumis onklon Ivan. — Ni persekutas la germanojn. . . La knabo restu ĉe vi.

Iun tagon la vilaĝa anoncisto disfamigis ordonon de la sovetaj registaro: Ĉiuj elmi-grintoj el Ruslando, inkluzive infanojn, devas reveni senprokraste en sian landon.

La familio de onklo Ivan obeis la ordonon. Lastfoje la familio tagmanĝis kune. Onklino Gina ploris, kvazaŭ perdas propran infanon. Ankaŭ Ivanĉjo ploris.

Onklo Ivan premis la junulon al sia brusto, kisis lian frunton kaj ekploris. La saman tagon li akompanis Ivanĉjo al Ruse kaj prezentis lin al la sovetaj reprezentanto. Antaŭ la disiĝo ili fotografis sin. La foton onklo Ivan gardis en sia dormoĉambro kaj ofte rigardis ĝin, fluŝtrante: "Filo mia, kial vi ne skribas al mi?"

Pasis pli ol dudek jaroj. Nenia signo de Ivanĉjo. Onklo Ivan kormalsanis kaj ne esperis revidi lin.

Iutage onklo Ivan ripozis sur la verando, kiam iu sonoris ĉe la ekstera pordo. Li mal-supreniris kaj malfermis. Antaŭ li staris sovetaj ofiĉiro. Li salutis bulgarlingve kaj demandis:

— Ĉu vi memoras min, onklo Ivan?

Komence onklo Ivan ne povis diveni, kiu povas esti tiu agrabla homo. Fiksante tamen la rigardon al la gasto li perceptis, ke tio estis neniu alia krom lia amata Ivaĉjo, nun jam kolonelo. Li forte brakumis lin plorante pro ĝojo. Onklo Ivan invitis lin eniri la ĉambron, kie baldaŭ venis onklino Gina, la du filoj kaj la ceteraj hejmanoj, ĉar la filoj jam estis kun edzinoj kaj infanoj. Al ĉiuj Ivaĉjo disdonis donacojn el Sovetunio. Ĉiuj estis treege ĝojaj pro tiu neatendita renkontiĝo, sed onklo Ivan precipe multe ĝojis, ĉar lia Ivaĉjo jam estas kolonelo, kun brusto ornamita per medaloj pro merito kaj braveco.

Poste sekvis riĉa regalo per bongusta ŝafidsupo, bovidmangaĵoj, bonaj trinkaĵoj kaj diversaj dolĉaĵoj. Ivaĉjo (tiel ni daŭrigos nomi lin) interalie rakontis pri sia vivo en Sovetunio, kie li fariĝis estimata homo. Fine li diris, ke por kompensi almenaŭ iom ĉion faritan de liaj savintoj, li proponas al ili longan ekskurson tra Rumanio kaj Sovetunio.

Oni akceptis kun kora danko tiun ĉi proponon kaj la sekvan tagon geonkloj Ivan kaj Gina kaj la du filoj preparis sin por tiu longa ekskurso. Estis belega tago kaj ĉiuj estis kun bonega humoro. Vigle marŝante ili kun Ivĉjo atingis la fervojstacion kaj per la rapida vagonaro forveturis al Varna, poste ili vizitis Burgason, Plovdivon kaj Sofion. En ĉiu urbo ili pasigis po kelkaj tagoj, trarigardante la rimarkindaĵojn. La tagoj pasis ĝoje kaj ĉiuj estis kontentaj. En Sofio Ivĉjo proponis, ke ili vizitu la sovetan ambasadejon. La vizito estis anticipe preparolita kaj la kvin gastoj estis akceptitaj afable kaj kore. Ĉiuj brakumis kaj kisis onklon Ivan, kiun oni ordenis pro lia heroaĵo.

Post la vespermanĝo, en amika rondo ĉiuj interparolis pri la heroaĵo de onklo Ivan. Li, kiu estis jam sufiĉe aĝa, rememorante klare la trajnon kun la rusaj infanoj, la sveltan blondharan junulinon, kuŝantan sur la vagonplanko kaj batatan per rimenvipo de la faŝisto, ne povis elteni. Lia vizaĝo paligis. Eksentinte akran doloron en la koro, li ekkriis: „Ivĉjo, venu ĉe min! Mi jam mortas!„

Ivĉjo proksimiĝis kaj milde kisis sian savinton, trankviligante lin, Onklo Ivan kisis varme Ivĉjo kaj karesetis lian blondan hararon.

Malgraŭ ĉiuj zorgoj flanke de la sovetaj senditaro la sanstato de onklo Ivan fariĝis ĉiam pli malbona kaj fine li forpasis en la manoj de sia kara Ivĉjo.

Stojan VOJĈEV

Noto de la redakcio: La aŭtoro de la rakonto — nun veterana esperantisto, estis atestanto de la okazintaĵo pri-skribita en la rakonto.



ORA GARBO

Ĥristo Radevski, AMO MIA. El la bulgara tradukis Venelin Mitev. Sofia-pres, 1988, 107 p.

Dum la Jubilea Jaro (1987) nia kontribuo al la esperanta poezio estis signifa: aperis du antologioj, verskolektoj de Ĥristo Botev, Nikola Vapcarov kaj Penjo Penev. Kaj nun — nova ĝoja evento por la bulgaraj esperantistoj — ŝatantoj de poezio: ĵus trafis niajn manojn nova libro — „Amo mia“. La aŭtoro Ĥristo Radevski aperis sur la horizonto de la poezio en la fino de la 20-aj jaroj. Profundan plaĉon ĉe la laboristoj rikoltis lia versaĵo „Al la Partio“ — unu el la pintaj atingoj de la bulgara proleta revolucia poezio, verkita en 1929. Per tio ĉi lia sorto estas intime ligita kun la sorto de la laborista klaso kaj ĝia avangardo.

Radevski dediĉis sin al la revolucia literaturo kiel redaktoro de la semajna gazeto RLF (Literatura Laborista Fronto) kaj poeto-antifaŝisto post la frakaso de la heroo Septembra Ribelo (1923). Lia unua volumo titolita „Al la Partio“ (1932) estas brila esprimo de nova impeto de la bulgara laborista revolucia movado kaj nova etapo en la evoluo de la bulgara proleta poezio.

La obskurantismaj faŝismaj reĝimoj persekutis kaj multfoje arestis lin, sed li ne klinis la kapon antaŭ potenculoj, deklamante:

**Kaj mi postenos ĝis la lasta spiro,
obstinis mi, batalos mi sen lac'...**

Dum sia sesdekjara literatura agado li verkis centojn da versaĵoj. Iuj el liaj fruaj ver-

koj aperis dum la 30-aj jaroj en laboristaj Esperanto-gazetoj, sed por unua fojo nun estas eldonita en Esperanto volumo da poeziaĵoj kun antaŭparolo de profesorino Milena Caneva, kio helpas la legantojn orientiĝi pri la literatura agado de la poeto.

Per la volumo „Pulso“ (1936) kaj „Kiam ne sufiĉis la aero“ (1945) la aŭtoro plilarĝigis la idean-emocian karakteron de sia liriko kaj pentras la socian batalon inter la du mondoj. Ĉiam antaŭ li brilas la celo:

**...tra fumo kaj cindrejoj, kaj malvarmo,
malsato kaj kolero, persekut'
vidiĝas kiel la ĉiel' tra pluv' somera
la tago de eterna nia ideal'.**

En socialisma Bulgario Radevski partoprenas aktive en la konstruado de socialisma kulturo, tradukas el la soŭeta poezio. Se en la komenco li alvokis la tagojn „Flugi pli rapide“, por ke „kunfluigu revoj kaj homa vivo“, pli poste lia koncepto estiĝas pli saĝa kaj profunda. Li konstatas, ke longa kaj malfacila estas la vojo al la idealo. Tamen estas grave: iri renkonte al ĝi kaj vigligi la kadukiĝintojn. Per sia plumo li vipas renegatojn, perfidulojn, hipokritulojn, snobojn, karieristojn — ĉiujn, kiuj metas obstaklojn sur la vojo al la nova vivo. Li estas postulema, senindulga pri la negativaj flankoj de la vivo kaj samtempe kredanta pri la brila estonto de la socialismo kaj alvokanta al krea laboro. Lia muzo gloras la rekonstruon de la socio, la rekonstruon de la homaj animoj kaj koroj.

„Amo mia“ komenciĝas per la versaĵo-konfeso „Al la Partio“. La ceteraj poeziaĵoj, elektitaj laŭ bontrovo de la aŭtoro mem, distingiĝas per sia varia enhavo, perfekta konstruo, novaj sentoj, pensoj, meditioj.

La tradukinto Venelin Mitev apartenas al la postmilita generacio. En tiu ĉi libro li montras sin kiel virtuozo de la tradukarto. Li scias trovi rimojn kaj meti ilin sur la ĝusta loko, dank' al kio la versaĵoj sonas kvazaŭ originale verkitaĵoj en Esperanto. La redaktoro Georgi Miĥalkov kontribuis al la bela kaj valora volumo.

Gratulon pro la ora garbo poezial!

Ĥristo GOROV

„TANGO“ EN ESPERANTO

Karaslavov, Georgi: „Tango“, Esperantigis
Petâr Todorov kaj Nikola Uzunov. Redaktis:
Evgeni Georgiev. Eldonis: Bulgara Esperan-
tista Asocio. Presejo: Sofia Pres, 1988 p. 93.

Antaŭnelonge Bulgara Esperantista Asocio eldonis novan valoran verkon en Esperanto. Tio estas la romano „Tango“ de la klasikulo de la bulgara literaturo Georgi Karaslavov. La nomo de Karaslavov estas bone konata al la Esperanto-legantoj, ĉar alia lia romano — „Bofilino“, tradukita en Esperanton, havis grandan sukceson.

„Tango“ ne estas ampleksa verko, sed ĝi realisme kaj ĝuste prezentas gravan momenton el la pli nova historio de nia popolo, nome la kontraŭfaŝisman batalon en nia lando. Impresas, ke Karaslavov ne rakontas en beletra formo tion, kion ni jam scias de la historio pri tiu ĉi periodo, sed li talente kreas vivajn figurojn kaj profunde penetras en la komplikajn problemojn de tiu tempo.

Kvankam kutime en siaj verkoj Karaslavov sekvas la tradician rakontmanieron de la grandaj bulgaraj verkistoj, en „Tango“ li elektis tre interesan beletran formon.

La novelo konsistas el tri partoj. En la unua parto la aŭtoro prezentas la reprezentantojn de la burĝa klaso. En la dua parto li pentras la malfacilan kaj pezan vivon de la bulgaraj vilaĝanoj kaj en la tria parto li enkondukas la legantojn en la malliberejon, kie konatigas ilin kun la tri junaj mortkondamnitaj komunistoj.

Legante supraĵe la libron, oni povas ekhavi la impreson, ke la tri partoj de la novelo ne estas ligitaj inter si — ja la herooj, reprezentantoj de antagonismaj klasoj, fakte ne konfliktas rekte, eĉ ne konas unu la alian. Sed tio estas malĝusta konstato, ĉar la aŭtoro pere de la kontrasto, dank’ al majstra priskribo de la situacio, kiu ligas la partoprenantojn en la romano, kreas tutecan impresan verkon.

Karaslavov talente pentras siajn heroojn kaj laŭ mi tio estas la plej granda merito de la novelo, ĉar pere de ili la aŭtoro sukcesas delikate sugesti al la leganto siajn pensojn kaj ideojn.

En la unua parto Karaslavov direktas la atenton de la legantoj al la ĉefprokuroro Jorgov, reprezentanto de la burĝaro, sed tiu he-

roo ne estas pentrita nur per nigraj tonoj. La verkisto emfazas, ke Jorgov estas inteligenta, homo kiu bone komprenas, ke la milito donis eblecon al kelkaj spekulantoj rapide riĉiĝi, ke dank’ al la korupto ili fariĝis gravaj komercistoj, milionuloj. Sed por Jorgov — „spiritita aristokrato“, devenanta el malnova komercista familio, ne ekzistas pli oportuna ideologio ol la faŝismo, kiu nutras liajn iluziojn pri supereco.

Simila al Jorgov estas ankaŭ la heroino de la novelo Katja Havaĝieva, ŝi elstaras per siaj beleco kaj ĉarmo, per sia kulturo. Filino de supera cara oficiro, ŝi ricevis altan klercon, sed ŝi profunde malamas la komunistojn, kaj ŝi rigardas ilin kiel sovaĝulojn, kiuj havas neniajn noblajn idealojn.

El la luksa burĝa domo, kie oni festas naskiĝtagon, Karaslavov kondukas la leganton al la vilaĝo, kie naskiĝis la tri junaj komunistoj Jurdan, Ivan kaj Boris kaj li prezentas al ni la gepatrojn de la tri junuloj.

Karaslavov bone konas la bulgaran vilaĝon de tiu tempo kaj ne idealigas ĝin. Tie regas mallumo, mizero, sed la vilaĝanoj, la gepatroj de la tri komunistoj, estas laboremaj, honestaj homoj kaj ili realisme, sobre rigardas al la okazintaĵoj. Karaslavov trafte karakterizas tiujn modestajn homojn, kies figuroj reliefe ekstaras antaŭ la legantoj.

En la lasta parto de la novelo la verkisto pentras la junajn komunistojn mem. La tri junuloj prezentas tri diversajn mondojn, malgraŭ ke havas unu saman idealon. Dum Jurdan estas homo de la ago, kiun allogas la batalo, Ivan estas romantikulo, ema al kontemplado. Boris, la tria, impresas per sia firma karaktero.

* * *

La du tradukintoj de la novelo Petâr Todorov kaj Nikola Uzunov bonege plenumis sian taskon. Ili sukcesis en flua Esperanto transdoni la stilon de Karaslavov, kiu estas tre bildeca kaj karakterata. Mi konstatas, ke la redaktoro Evgeni Georgiev ege serioze laboris super la manuskripto, bone unuigis la esprimmanierojn de la tradukistoj kaj la legantojn ne ĝenas la fakto, ke la novelo tradukis du personoj.

Per „Tango“ Karaslavov riĉigis la bulgaran literaturon. La novelo donas bonan eblecon al la eksterlandaj Esperanto-legantoj ankoraŭfoje enrigardi en la realisman literaturan kreadon de tiu ĉi talenta bulgara verkisto.

Georgi MIĤALKOV

distro

PLANTOJ-SIMBOLOJ

Ekde plej antikva tempo multaj plantoj estis ŝataj kaj adorataj de la homoj. Pro tio multajn oni povas vidi sur ŝtataj standardoj, sur blazonoj, ordenoj kaj medaloj, sur moneroj k. a.

Tritikaj spikoj videblas sur la blazonoj de PR Bulgario, Sovetunio, GDR, Rumanio kaj Albanio. Sur la blazonoj de Kirgizio, Azerbajĝano, Turkmenio, Taĝikio kaj Uzbekio estas belegaj branĉetoj de kotono — la blanka oro de la mezaziaj landoj. En la blazono de Kartvelio estas prezentita tea plantejo. Vinberaj grapoloj estas komponantoj en la blazonoj de Armenio kaj Moldavio. Krom vinberaj grapoloj en la blazono de Moldavio estas prezentita ankaŭ la maizo. Kelkaj kverkaj folioj estas videblaj en la blazono de Litovio. Junipera branĉeto estas reproduktita en la blazonoj de Estonio kaj de la Karelofinna Aŭtonoma Soveta Socialisma Respubliko.

Granda acera folio estas prezentita en la blazono kaj sur la standardo de Kanado. Majesta palmo videblas sur la ŝtataj blazonoj kaj standardoj de Haitio. Kompakta laŭra krono ornamas la blazonojn de Uru-

gvajo kaj Gvatemalo. Kinina arbo estas en la blazono de Peruo. Kaktos estas pentrita sur la standardo de Meksikio. Kaj miljara cedro kun densa verda krono — sur la standardo de Libano.

Granda simbolo de Japanio ekde antikvaj tempoj estas la krizantemo. Ĝi havas lokon en la ŝtataj blazonoj kaj sigeloj, sur diversaj ordenoj kaj medaloj. La plej granda ŝtata premio en Japanio estas la „ordeno de la krizantemo“. En Bulgario — fama en la mondo kiel lando de rozoj, ekzistas „Ordeno de la Rozo“, alta ŝtata ordeno, aljuĝata nur al virinoj — alilandaninoj.

Por la popoloj de Egiptio kaj Hindio ekde antikvaj tempoj la blanka lotuso estas sankta planto. Ĝi estas reproduktita sur multaj standardoj kaj en la verkoj de la pentroarto kaj de la arkitekturo. La nacia floro de Francio estas la blanka akacio, de la nederlandanoj — la tulipo, de la ĉinoj — la flava narciso. La ruĝaj diantoj estas simbolo de la Portugala revolucio, de la batalo kontraŭ la faŝismo en Portugalio. La olivbranĉo estas simbolo de la batalo por paco. En Bulgario la sovaĝa geranio estas simbolo de sano.

Sur la blazonoj de multaj urboj same estas reproduktitaj plantoj. Ekzemple en la blazono de urbo Liono (Francio) estas branĉetoj de moruso, en la blazono de la skota urbo Glasgow potenca kverko etendas siajn branĉojn, en la blazono de Ravena (Italio) estas videbla pino. Multaj arboj estas simboloj de apartaj urboj de Sovetunio: — de Kievo — kaŝtanarbo, de Minsko — tilio, de Odeso — blanka akacio, kaj platan, de Herog (en Krimeo) — piramidforma poplo, de Soĉi — svelta cipreso, de Bakuo — pino.

Dimităr HAĜIEV



KANKRO

(22 de junio — 22 de julio)

Kankroj opinias sin bravuloj.
Ruzaj estas, tute ne stultuloj!
Kvazaŭ hontemaj, bonaj, taktemaj,
fakte — profitejaj, praktikemaj.

Jen nun ili estas „afabletaj“,
jen incitas ilin aĵoj etaj;
nun — jen ridetantaj, babilemaj,
morgaŭ — tro fieraj, suspektemaj. . .

Aŭto, dom-, vilaoposedantoj,
nepre ekfariĝu riĉkaŝantoj,
ĉar la „bonaj“ kankroj ne formortas
ĝis havaĵon fremdan ne forportas.

Se ebligus, eĉ la ŝtaton same
ili rabos for „feliĉe-fame“. . .
Do, centfoje iuj reedziĝas
kaj profitriĉaĵoj ekbrabigas.

Dum edzeco per mensog' sukcesos.
Ĉiam alidorse ekprogresos.
Sen skandaloj ne travivos tiu ulo,
doni nur nenion — jen regulo. . .

Kankroj geedzecon ne bonigas —
vir' virino — kornojn surkapigas.
Kaprikorn' tuj ilin superfortas,
haste al ilia lok' eskortas!

AMUZA ZODIAKO



LEONO

(23 de julio — 23 de aŭgusto)

Bonkonataj estas la Leonoj,
kun tutmondaj ĝustaj plenrekonoj!
Ili estas tre ĝentilaj, bonaj,
noblaj, komplezemaj kaj sindonaj

Oficeje ĉiam ekprosperas,
estri saĝe, juste ja preferas.
Hejmen ne tre ofte revenemas,
(tie pri kompanietoj temas).

Povas tiel vivi do senfine,
enamiĝas al mortemaj aŭ „diinoj“ . . .
Ĉion donas ili, malavaras,
apatie for de vi ne staras.

Sed je ĉio inoj vin senigos
eĉ jungile vin ĉirkaŭkoligos. . .
Celoj: rego, riĉo, glor', prospero,
sed por iuj ili restas nur himero.

Se Leono jam propaĵon ekhavas,
kaptas ĝin Leon' pli forta, kiu gravas. . .
Alten ekrigardas la Leono,
iam trafas lin profunda drono.

Eĉ „droninta“ — tion ne konfesas,
sian fierecon altaprezas!
Kun Amforo li neniam ludu,
por ke tiu malfeliĉon ne altrudu ! ! !

Esperantigis: Asen JOSIFOV

PLI OFTE DISTRA PAGO

Mi plezure legas la materialojn en la distra pago de nia revuo „Bulgara Esperantisto“. Pli multaj enigmoj diversspecaj kaj aliaj solvendaj taskoj estas ĉiam bonvenaj por mi.

Sed ĉu la distra pago estas alloga por ĉiu? Kiel ekscii tion? Do, mi turnas min al la legantoj de tiu pago: skribu al la redakcio, esprimu vian opinion! Solvintoj sendu la solvojn! La nombro de ricevitaj leteroj estos siaspeca mezurilo pri la intereso de la legantaro al similaj materialoj. Krome, skribante en Esperanto, oni havos plian okazon ekzerci sin pri la lingvo.

Rangel DIMČEV, eksĉampiono pri malpeza atletiko, Sofio

Karaj legantoj

La propono de s-ro Dimčev estas interesa kaj la redakcio decidis profiti ĝin. Ni provu!

Jen, je via dispono estas vortenigmo kaj „kaŝita“ proverbo.

Viajn leterojn kun opinioj kaj solvoj ni atendos ĝis la 15-a de oktobro 1988. La solvon de la vortenigmo kaj la tekston de la proverbo vi trovos en n-ro 1/1989.

La redakcio deziras al siaj legantoj agrablajn minutojn kun nia distra pago!

„BE“

ANGULENIGMO

(En ambaŭ direktoj)

	A	B	C	C	D	E	F	G
A								
B								
C								
C								
D								
E								
F								
G								

A. Nomo de lando. B. Universala religio (en akuza-tivo). C. Speco de konkurso por skiantoj kaj kanuistoj (radiko). Ĉ. Forta ligna stango, malsupre pintigita, kiun oni starigas enigante ĝin en la teron (radiko). D. Verbo, esprimanta koran inklinon al iu, kies feliĉon oni deziras (en futuro). E. Vorto, uzata por distingi objektojn aŭ estaĵojn disde aliaj (radiko). F. Sufikso. G. Simbolo de nulo.

SEKVAnte LA MOVOJN DE LA ĈEVALO

*	A	FI	RO	TAS	*
KO	*	BE	LA	*	ZO
LA	DE	MI	TRE	PLEJ	ES

1. Komencante de la litero A (graseta) kaj sekva-te la movojn de la ĉevalo en la ŝakludo, trovu konatan proverbon el la proverbaro de Zamenhof.

Kompilis: Dimităr HAĜIEV

Anekdotoj

- Sur tiu ĉi loko en jam delonge pasintaj tempoj — rakontas la ĉiĉerono al la turistoj — rabistoj atakis la vojaĝantojn kaj senkompatite ilin prirabadis.
- Kaj nun? — demandas unu el la turistoj.
- Nun tie ĉi estas konstruita luksa hotelo.

Maristo reveninte hejmen post navigado, demandas sian bopatriron:

- Kion vi diros pri tiu gaja simieto Koko, kiun mi antaŭnelonge sendis al vi?
- Se mi devas esti sincera, mi diros al vi, ke la bo-vidaĵo estas pli bongusta. . .

Dum speciale organizita ĉasado altranga persono de-mandas:

- Kiel nomiĝas la besto, kiun mi ĵus mortpafis en tiuj arbustoj?
- Momenton, por ke mi kontrolu!
- Post nelonge la ĉasisto revenas.
- Oni nomas lin Smith, tiel estis skribite en lia pas-porto. . .

Interparolas du viroj en vagonaro.

- Vi certe antaŭnelonge ĉesis fumi?
- Jes, tiel estas. Kaj kiel vi tion konstatis?
- Kiam vi luncis, vi lasadis la biskvitojn en la cin-drujon.

— Kaj vi nomas tion miniaturo! Tiu grandega pen-trajo!

- Kial ne? Mi ricevis mendon de konata riĉa komer-cisto, kaj li deziras posedi la plej grandan minia-turon.

Maŝtalski renkontas sian amikon kaj lin demandas:

- Kien vi iras?
- Mi partoprenos provkantadon de la lioro.
- Kaj kion vi faras tie?
- Ni kartludas, drinkas bieron. . .
- Sed kiam vi kantas?
- Kiam ni revenas al niaj hejmoj. . .

Tradukis el la bulgara humura gazeto „Strășel“ (Krabro) Stefka ĈENKOVA

FOTO DE LA NUMERO





KRASIN HIMIRSKI

* * *

Klam ni naskiĝas?
Ĉe l' vojkruĉo de du homaj sortoj;
En lu forgesita kiso;
Aŭ klam nia krio kiel kant' alaŭda
trafendas la matenon de unua nia tago?
Aŭ eble ankaŭ ĉiun horon?

Klam ni elkreskas?
En la ĝojego pro unuaj niaj paŝoj;
Kaj ĉe l' diveno de l' enig' unua;
aŭ kiam hela ombr' sur nia frunt' kuŝiĝas;
kaj klam ni en du okuloj serĉas amon?
Aŭ eble ankaŭ ĉiun horon?

Klam ni jam estingiĝas?
En la tristeco de l' unuaj larmoj;
Aŭ kiam antaŭ foraj horizontoj
Senfortaj lasas ni la manojn fali;
Aŭ kiam nin la subiranta sun' bruligas?
Aŭ eble ankaŭ ĉiun horon?

El la bulgara: Dimităr HAĜIEV

GEORGE TOPIRČEANU

LA TESTUDO

El ĝi nenon tute oni vidas.
Ŝtonbloko. . ., se vi lasos ĝin en paco.
Ĝi puŝas nazon el sub karapaco
kaj poste tuj ekiri ĝi decidas.

Kiom da formoj pli malpli bizaraj
kun travideblaj aŭ opakaj vestoj
bezonis vesti vivo sen protestoj
dum grandaj transformiĝoj multmiljaraj!

Ĉar ĝi trovante formon pli perfekta
de famili' ameba ĝis insekta
vagadis en supoz' kaj aventuro.

Ho, kia longa vojo sensacia,
ĝis kiam povis krei la Naturo
gracian formon de karino mia.

Elromanigis: Konstantin BRAȘEVANU

Noto de la Redakcio: La tradukisto gastis en Bulgario, kie li travivis belajn tagojn. Tiu traduko estas lia persona danko al liaj bulgaraj amikoj-esperantistoj.

INTERNACIA JUNULARA SEMINARIO EN PISANICA

La 26—30. 09. 1988 en la Internacia E-Kursejo — Pisanica, Bulgara E-Junularo organizas sian tradicion internacian junularan E-seminaron kun ĉeftemo „La junaj talentuloj en la E-kulturo“. Se vi interesiĝas pri muziko, teatro, belarto, literaturo kaj emas prelegi aŭ partopreni liberan disputon, bonvolu aliĝi!

La prezo estas 84 lv (190 gld.) kaj inkluzivas tranoktadon dum la menciita tempo, nutradon, kulturprogramon, diskotekon, ekskursojn al la fama ripozloko Pamporovo, pinto Snejanka kaj la ĉarma vilaĝo Siroka Lâka.

Ni atendas viajn aliĝilojn ĝis 31. 08. 1988 laŭ adreso:

1303 Sofio
bul. Hr. Botev 97
Bulgara E-Junularo

RENKONTIĜO DE SAMSORTULOJ

De la 1-a ĝis la 7-a de novembro 1988 okazos landa Renkontiĝo de Esperantistoj-Invalidoj kun partopreno de eksterlandaj samsortuloj. La evento estos aranĝata en



Hodonin (proksime de la foirurbo Brno) en moderna refreŝigejo de nia Asocio de Invalidoj.

La renkontiĝon partoprenos esperantistoj-invalidoj el USSR, Hungario, GDR kaj Pollando.

Ni invitas vin partopreni nian renkontiĝon kaj konatiĝi ne nur kun niaj sekcianoj, sed ankaŭ kun niaj eksterlandaj amikoj kaj samsortuloj.

Nia adreso:
Josef Vaněček, Soukenická 58
CS-27401 Slaný, ĈSSR.

LETERVESPERO ORGANIZOTA

Okaze de la „Internacia Tago de Mondpaco“ — 1-a de septembro 1988, la E-grupo en Dessau aranĝos letervesperon kaj ekspozicion.

Ni atendas salutleterojn, E-aĵojn, desegnaĵojn ktp. por demonstri la disvastiĝon de Esperanto. Ĉiu sendinto ricevos respondon.

Ni bezonas ankaŭ vian salutkarton!

Skribu al:
S-ro Uwe Heidrich Augustenstr.
8,4500 Dessau, GDR.



EN LA URBO DE SIRINGOJ

La 23-an de aprilo 1988 sub devizo „Arto, beleco kaj prospero“ en Loveĉ okazis la Oka Tradicia Esperanto-Renkontigo, organizita de Esperanto-societo „Espero“ — Loveĉ. Partoprenis ĉirkaŭ 200 esperantistoj el la tuta lando.

La Interkona Vespero okazis en restoracio „Strateŝ“, situanta sur la siringa deklivo de la altaĵo „Strateŝ“. E-grupo el la lernejoj „Todor Kirkov“ kaj „Hristo Kârpaĉev“ prezentis belan literaturan kaj muzikan programon, kiun partoprenis ankaŭ ĉambra konsisto el urbo Gorna Orjaĥovica kun direktonto Enĉo Balanov. Por la unua fojo la Interkona Vespero estis „senfuma“, kaj tamen tre gaja, emocia.

Antaŭ la vespermanĝo niaj gastoj, akompanate de Esperanto-ĉiĉerono, vizitis la vidindaĵojn de Loveĉ: la arkitekturan historian rezervejon „Varoŝa“, la muzeon kaj la monumenton de Levski, la naskiĝdomon de la unua bulgara kosmonaŭto Georgi Ivanov k.a. La 24-an de aprilo ili vizitis ankaŭ la urban zoogardenon — duan laŭ grandeco en Bulgario, situantan en la siringa parko „Strateŝ“. Post tre agrabla promenado tra la parko oni disigis — kontentaj kaj dezirantaj denove viziti la siringan urbon venontjare, kiam dum la „Siringa Vespero '89“ estos organizita ankaŭ nacia konkurso de originala kaj traduka Esperanto-poezio.

D-rino Mirena DENIZOVA



ZORGO KAJ RESPONDECO

La 14-an de aprilo k. j. okazis la organiza ĉefkunveno de esperantista klubo „Metalurgo“, funkcia enkadre de la Kulturdomo ĉe la entrepreno por prilaboro de aluminio „Stamen Stamenov“ en urbo Sumen.

La prezidanto de la Klubo, scienca kunlaboranto ing. Nikolaj Kalev, prezentis la oficialajn gastojn — la prezidanton de la Komunuma societo „Vekiĝo“ — Hristo Tonev, kaj la direktorinon de la entreprena kulturdomo — Emilija Petrova. La prezidanto informis pri la kluba agado.

En siaj eldiroj la klubanoj aktive kaj zorgoplene parolis pri la problemoj de la klubo kaj pri la eblecoj lerni kaj uzi Esperanton. Estis esprimita kontento pro la apogo al la klubo flanke de la entrepreno kaj de la publikaj organizaĵoj kaj pro la konkreta helpo fare de la Kulturdomo, en la persono de ĝia direktorino, kiu, mem ĉeestante la kunvenon povas ekhavi personajn impresojn pri la Klubu, pri ĝiaj membroj, pri la lingvo Esperanto, kaj pri la klubaj problemoj. Interalie la parolintoj esprimis opinion, ke delonge maturigis kondiĉoj por emisiado de kurso de Esperanto per la Televido kaj la Radio, por disaŭdigo de informoj por eksterlando kaj emisioj por la bulgaraj esperantistoj. Oni emfazis la neceson de eldonado kaj liverado de libroj kaj periodaĵoj el la aplika sfero, por ebligi utiligon de la lingvo en profesio. Ne mankis plendoj pri malbone organizita liverado de lernolibroj kaj vortaroj. Oni parolis ankaŭ pri la nesufiĉa utiligo de la bonega kaj reprezenta kursejo en Pisanica.

La prezidanto de la komunuma estraro salutis la kunvenon kaj esprimis kontenceon pro la vera entuziasmo de la klubanoj. Li informis pri la aktuala stato de la societo kaj pri la oficialaj kontaktoj kun komunumaj estraroj de publikaj organizaĵoj kaj administraj gvidorganoj. La direktorino de la Kulturdomo salutis la kunvenon, esprimis bondezirojn pri kreiva laboro kaj substrekiis, ke la Kulturdomo kaj la entrepreno daŭre subtenos la Klubon. Ilija Andreev, gvidanto de la Klubu, informis, ke la Entrepena Sindikata Komitato premiis pro aktiva kluba agado kvin aktivulojn.

Post la pridiskuto de la raporto la kunveno aprobis Decidon, per kiu ĝi esprimas dankon pro la subteno kaj devigas la estraron labori ankoraŭ pli aktive por propagandi Esperanton kaj stimuli ties aplikadon.

Post detala pridiskuto, per sekreta voĉdonado, estis elektita kvin-membra estraro. La novelektita estraro, en sia unua kunsido unuanime elektis kiel prezidanton de la Klubu ing. Nikolaj Kalev. La nova estraro, konsiderante la aktualajn problemojn, klopodos plenumi la taskojn, kiujn komisiis al ĝi la kunveno.

Ilija ĀRISTOV

UNUIGINTAJ SOCIETOJ

Sciante estas, ke laŭ decido de la Plenkunsido de CE de BEA de 16. I. 1988 estis fonditaj E-societoj laŭ loĝado. Sur la vasta teritorio de la eksa dua Sofia subdistrikto „V. Kolarov“ agadis E-societo „Penka Mihajlova“. Nun tiu ĉi societo entenas nur parton de tiu teritorio — nome la nova komunumo „Serdika“. Sur la teritorio de la komunumoj „Nadejda“ kaj „Vrăbnica“ fondiĝis E-societo „Espero“.

La 25-an de aprilo 1988 la Junulara Kultura Domo „Lilia Karastojanova“ malfermis siajn pordojn por la geesperantistoj el Nadejda kaj Vrăbnica.

En la kunveno CE de BEA festis reprezentita de Radoslav Paraskevov, sekretario de la Komisiono pri Organiza Agado. Li eksplikis la kialojn por la fondiĝo de nova societo. Ĉiuj konsentis, ke la nomo de la societo devas esti „Espero“, kiel la nomo de la komunumo mem. („Espero“ — bulgarlingve „nadejda“. Vidu supre la nomon de unu el la menciitaj komunumoj!)

Kiel prezidantino de „Espero“ unuanime estis elektita Ĵečka Pavlova, agema esperantistino el la eksa E-societo „Prospero“. Ŝiaj du filoj ankaŭ estas agemaj esperantistoj. En la estraro oni elektis inter aliaj du tute junajn esperantistojn — unu el ili estas Conka Stojanova — lernantino en X klaso.

Tre grava estas la fakto, ke la kunvenon partoprenis la prezidanto de Patrolanda Fronto en komunumo „Nadejda“ Georgi Rangelov kaj la gvidantino de la Klubo de Internacia Amikeco „Lilia Karastojanova“ la instruistino de rusa lingvo en 16-a gimnazio Maria Vasileva, kiuj promesis helpi la laboron de la nova societo. La prezidantino Ĵečka Pavlova donacis al ambaŭ gastoj lernolibrojn de Esperanto kun memorskribo.

Marija Angelova anoncis, ke la informa bulteno „Abelo“, kiun eldonas la esperantistoj sur la teritorio de la eksa dua subdistrikto de Sofio, daŭrigos aperi kiel eldono de ambaŭ societoj — „Penka Miĥajlova“ kaj „Espero“. La eksterlandaj societoj, kun kiuj s-to „Penka Miĥajlova“, amike korespondas, estiĝos amikaj ankaŭ al la societo „Espero“.

Ambaŭ societoj sukcese agados.

Marija P. ANGELOVA

DUA TURISTA MARŜO

Dum 1987, omaĝe al la 100-jariĝo de nia kara lingvo Esperanto, grupo da entuziasmuloj — gejunuloj el Ruse kaj la regiono, efektivigis turisman marŝon. Al ili helpis la eksa Distrikta Estraro de BEA — Ruse, kaj la Komunuma Turista Unuiĝo — Ruse. Post la finiĝo de la marŝo, ambaŭ estraroj decidis, ke ĝi fariĝu tradicia. Ĉi-jare la 7-an de majo, je la 9-a horo, antaŭ la Monumento de la Libereco, en la ceniro de Ruse, 15 gejunuloj startis por partopreni la tradician turistan marŝon — 100 km en 24 horoj.

La partoprenantoj estis varme salutitaj de la prezidanto de la Komunuma estraro de societo „Libero“ — Nadejda Sirkova, kaj de la prezidanto de la Komunuma Turista Unuiĝo en Ruse Bačvarov. La gejunuloj metis florojn ĉe la Monumento de la Libereco kaj startis. La vojplano inkludis famajn turismajn lokojn: la rokaj preĝejoj apud Ivanovo kaj la kaverno „Aĝla rokpinto“. Fina punkto de la marŝo ĉi-jare estis vilaĝo Dolapite, kie kolektiĝis ĉiuj radioj de turistaj marŝoj en la regiono, dediĉitaj al la 80-jariĝo de la organizita turisma junulara movado.

Delonge oni scias, ke organizita turismo kaj Esperanto-movado ĉiam bonege „marŝas“ kune. Tiu tradicia arango kontribuas por harmonia evoluo de la gejunuloj kaj por plifirmigo de la amikeco inter ili dank' al Esperanto.

Inĝ. Petăr KAVALĜIEV

El nia leterkesto

IMITINDA EKZEMPLO

En n-ro 1/1988 de „BE“ sub titolo „Por efika instruado“ aperis opinio de s-no Nikola Nikolov el Sofio, ke en E-kursoj oni devas ne nur instrui la lingvon, sed ankaŭ krei entuziasmajn kaj organizitajn agantojn en la esperantista movado. Opinio laŭ mi tute ĝusta. Bedaŭrin-

de la plimulto de la E-instruistoj kaj lektoroj ne komprenas tion, aŭ malbone faras ĝin. Dum la instruado ordinare la lektoro instruas kaj la kursanoj nur aŭskultas kaj skribas. Mankas interparolo en Esperanto, kantado, lernado de versaĵoj, didaktikaj ludoj, mankas la etoso necesa por starigo de daŭraj amikaj rilatoj. Kiel imitinda modelo por la E-lektoroj povas servi la Konversaciaj

Esperanto-Kursoj por Turistoj, unua kaj dua gradaj, organizataj en Sofio, kie la rezultoj estas tre bonaj.

La Komisiono pri Instruado ĉe BEA devas postuli de niaj kursgvidantoj ne nur instrui la lingvon, sed ankaŭ krei esperantistojn.

Ginka DILOVA

Noto de la redakcio:
Ĉi-sube ni donas ankoraŭ unu ekzemplon de modela instrulaboro.

EKSTERKLASA LECIONO

Dimanĉe, la 24-an de aprilo 1988 gelernantoj el la E-klubo el lernejo „Tanja Karpinskaja“ vizitis vilaĝon Krân. En la domo-muzeo de Cvjatko Radojnov ili aŭskultis bulgarlingvan paroladon pri la vivo kaj agado de Cvjatko Radojnov. La gelernantoj havis eblecon aŭskulti surbendigitan paroladon en Esperanto. Dume mi klarigis la novajn kaj nekonatajn vortojn, kiujn post la trarigardo de la muzeo la gelernantoj ripetis denove per mia helpo. Mi dankas al la ekskursgvidantino en Esperanto kaj unu lernanto tradukis al si en bulgara lingvon.

Ni gastis en la domo de la majstro Mitjo Minev, partoprenanto en la Septembra Ribelo 1923, kiu per figuroj de homoj kaj bestoj revivigas momentojn el la bulgara historio.

Fine ni vizitis ankaŭ la E-muzeon de Dimo Martinov, kie ni estis tre sincere akceptitaj. Li rakontis al ni pri la muzeo, pri sia kolekto de E-libroj, revuoj, leteroj kaj pri la historio de la loka E-societo. Kun granda intereso ni tralegis la leteron de la frato de Marius Van der Lube al Dimo Martinov. Li esprimis sian dankon al Georgi Dimitrov, kiu montris al la mondo, kiuj estas la veraj kulpuloj por la incendio en la Rajŝtago. Dum tiu vizito la gelernantoj eksciis pliajn novajn vortojn.

Reveninte en Gabrovo, dum nia unua E-leciono ni faris skriban rakonton pri nia interesa ekskurso.

Sonja TIĤOVA,
E-instruistino

KONCIZE

GABROVO. La 23-an de marto 1988 gelerantoj el la E-klubo en lernejo „Tanja Karpinskaja“ festis la alvenon de la printempo. Ili prezentis dramigon de la legendo pri la galanto, deklamis kaj kantis.

Estis aranĝitaj ekspozicietoj el leteroj de la gelernantoj el DDR, Ĉeĥoslovakio, Hungario kaj Pollando kaj florbildkartoj.

Gastoj de nia printempa vespero estis la vicedirektorino de nia lernejo Ganka Penkova, gepatroj, instruistoj, esperantistoj el E-societo „Verda Torĉo“ kaj samklasanoj de la E-gelerantoj.

Sonja TIĤOVA

PERNIK. La 4-an de aprilo j. k. la loka societo „Nova Vojo“ organizis artvesperon. La multaj ĉeestantoj aŭskultis la gramofondiskon „Ni vivos“, surbendigita de la aktoroj de Bulgara Esperanto-Teatro.

La 11-an de aprilo 1988 Georgi Mihalkov gastis al la esperantistoj en Pernik per 90-minuta prelego pri la Esperantaj literaturo kaj kulturo.

Nikola MITEV

PERUŠTICA. Esperanto-societo „Apostol Zlaĉev“ havas novan klubejon, kie la esperantistoj povos kunveni ĉe taso da teo aŭ kafo. La organizan kunvenon de la societo (25. 3. 1988) partoprenis 70 personoj. La prezidanto Stojan Zlaĉev — frato de la societa patrono, raportis pri la renovigo de BEA.

Stojan ZLAĈEV

ESPERANTO — PONTLINGVO. D-ro Ivan Ilkov el u. Varna kaj Georgi Litov, prezidanto de la Fervojista Sekcio de BEA, iniciatis bulgarlingvan eldonon de esperanta informkajero pri la Fervojmuzeo en u. Hamar, Norvegio. La muzeo, fondita en 1896 jaro, altiras la intereson de multaj bulgaraj esperantistoj. La bulgarlingva eldono de la prospekto disvastigas pere de la biblioteko de la Ministerio de Transporto, la bibliotekoj de la regionaj fevojdirektoj kaj la Fervojmuzeo en u. Ruse.

La bulgara traduko de tiu prospekto estas la 12-a traduko en nacia lingvo.

ĈU VI JAM SERĈIS LA VERDAN TRIFOLIION?

Nia konstanta rubriko „Deziras korespondi“ estas inter la plej preferataj. Je la unua vido tio estas seka kolono el nomoj, adresoj, aĝoj kaj hobiaj, sed fakte ĝi havas sian specifan ĉarmon. Malantaŭ la sekaj vortoj sin kaŝas homoj — junaj aŭ ne tiom junaj, gojaj kaj seriozaj, komencantoj kaj perfektuloj, homoj, kiujn proksimigas komunaj interesoj. Ili estas atendemaj — ili atendas vin, kara leganto, ili malpacience legos vian unuan leteron.

Se vi havas interesan korespondadon, kiu komenciĝis dank' al nia rubriko „Deziras korespondi“, skribu al la redakcio! Rakontu pri viaj amikoj, pri viaj renkontigoj kun ili, pri viaj komunaj travivaĵoj. La plej interesajn leterojn ni publikigos sur la paĝoj de la revuo.

La redakcia kolektivo de BE“ atendas viajn emociajn rakontojn.

„BE“



DEZIRAS
KORESPONDI

BULGARIO

DIANA ARNAUDOVA (16 jara) — Sofio, ĵk. Druĵba 2, bl. 211, vĥ. B, et. 8, ap. 54 — kun ĉi pri muziko, sciencfikcio kaj kino.

TEODORA GESEVA (16-jara) — 1156 Sofio, ĵk. Mladost, bl. 82, vĥ. A, et. 2, ap. 5 — kun ĉi pri muziko, literaturo kaj kino.

MARIA GEORGIEVA (16-jara) — 1100 Sofio, kv. Studentski grad. ul. 9 septembro, bl. 27, ap. 43 — kun ĉi pri ŝako, sporto kaj kino.

NADEJDA ANGELOVA (16-jara) — 1220 Sofio, kv. Tolstoj, bl. 34, vĥ. G, et. 3, ap. 62 — kun ĉi pri muziko, teatro kaj kino.

ADELINA MITEVA (16-jara) — 1172 Sofio, ĵk. Gervena zvezda, bl. 47—38, vĥ. E, ap. 100 — kun ĉi pri muziko, historio, pentroarto, kino kaj literaturo.

SEVDELINA GEORGIEVA (13-jara) — Veliko Tarnovo, kv. Asenov, str. D-r Vasil Beron 6 — kun samĝuloj tutmonde.

LJUBOMIR PAUNOV (17-jara) — u. Svoge, obl. Sofio, str. Ĉajka 5, bl. 2, vĥ. A, et. 5, ap. 13 — kun ĉi pri ĉi.

LJUBKA KRUMOVA (15-jara) — 2285 Tomsân, Sofia obl. — kun ĉi pri ĉi.

NELI IVANOVA (12-jara) — 2285 Tomsân, obl. Sofio — kun ĉi pri ĉi.

IVANKA ASENOVA (instruistino) — 2290 Iskrec, obl. Sofio, str. Ĥr. Botev 121 — kun ĉi pri ĉi.

STEFAN ALEKSANDROV (41-jara) — 2290 Iskrec, obl. Sofio — kun ĉi pri ĉi.

VALENTINA PAVLOVA (37-jara) — 2290 Iskrec, obl. Sofio — kun ĉi pri ĉi.

STANKA MILANOVA (47-jara) — 2290 Iskrec, obl. Sofio — kun ĉi pri ĉi.

BLAGOJ MILANOV (52-jara) — 2290 Iskrec, obl. Sofio — kun ĉi pri ĉi.

NIKOLAJ KOLEV (34-jara) — 5567 Baĥovica, obl. Loveĉ — kun ĉi pri ĉi.

SONJA PETROVA (11-jara) — 2260 u. Svoge, obl. Sofio — str. Murgaŝ 2 — kun ĉi pri ĉi.

ĈEĤOSLOVAKIO

ZDENKA RETRAKOVA (17-jara) — 100 000 Praha 10 — Strašnice, Pod Strani 2220/22 — kun ĉi pri ĉi.

POLLANDO

MARIA STRZEGOWSKA (27-jara, bibliotekistino) — 84-360 Leba, str. Olszewskiego 1 — kun ĉi pri turismo, literaturo, arto kaj lingvistiko.

RADOSŁAW RAGAN (20-jara) — Katowice, str. Stefana Batorego 7/11 — kun ĉi pri literaturo, historio, muziko, sporto kaj turismo. Kolektas BK.

MIROSLAV ISKIERKA (31-jara, instruisto) — 96-200 Rawa Mazowiecka — kun ĉi pri turismo, fotoarto, diapozitivaj.

DANIEL CHECKE (28-jara, fraŭlo) — 68-200 Zary, str. St. Batorego 2 — kun ĉi. Kolektas BK, prospektajn, mapojn, revuojn kaj librojn.

ELZBIETA ZABAWA (26-jara) — 58-500 Jelenia Gora, ul. Muzyczna 17. — kun ĉi pri teatro, opereto, baletoj.

MALGONATA KALISZEWSKA (32-jara, instruistino) — 31-868 Krakow, Os. 2 Polski Lotniczego 19/57 kun ĉi pri nuntempa kaj infana literaturo, folkloro, turismo kaj pedagogio.

JRENA RUSZUK (24-jara, oficistino) — 17-200 Hajnowka, str. Lenina 40/50 — kun ĉi pri muziko, turismo kaj literaturo.

Esperanta grupo (studentoj, inĝenieroj, kuracistoj) — 00-525 Varsovio, str. Krucza 23/31 m. 62, Krystyna Spysz-Piechcka — kun ĉi pri ĉi.

SOVET-UNIO

LINGAILE BILIUNAITE (21-jara, studentino) — 232051 Vilnius str. Zirmunu 22—28, Litovio — kun ĉi pri ĉi.

ANTANAS KRENCIČIUS (38-jara, matematikisto-programisto) — 232010 Vilnius, ab. k. 1634, Litovio — kun ĉi pri ĉi.

SANDRA GRIGARAVIČIUTE (20-jara, studentino) — 232007 Vilnius, str. Olandu 54—12, Litovio — kun ĉi pri ĉi.

LIUDAS VYTUTIS (19-jara, studento) — 232044 Vilnius, str. Karoliniškiu 22—28, Litovio — kun ĉi pri ĉi.

LINA MARMAITE (20-jara, studentino) — 232049 Vilnius, str. Archtektu 102—39, Litovio — kun ĉi pri ĉi.

LAIMA PAJAURYTE (20-jara, studentino) — 234566 Lazdijų raj, Lapsiu k., Litovio — kun ĉi pri ĉi.

ANNA BALANIK (35-jara) — 290012 — Lvov — 12, ul. Pojarskogo, d. 4—5, kv. 27 — kun ĉi pri ĉi.

LETA MAKAROVAITE — 234580 Alytus, A. Jonyro 9—73, Litovio — kun ĉi pri ĉi.

NI KONDOLENCAS

La 1-an de majo 1988 forpasis veterano Marin Dimitrov Marinov, naskita la 10-an de aprilo 1911 en la danuba urbo Ruse. Li lernis en la gimnazio de sia naskiĝurbo kaj poste studis en urbo Svištov, en la komerca altlernejo.

Fininte siajn studojn, li fariĝis altranga oficisto en la direkcio de bulgaraj fervojoj.

Post sia emeritiĝo li transloĝiĝis al Sofio kaj dediĉis sin al Esperanto, kiun li scipovis jam kiel gimnaziano. La 40-a Kongreso de BEA elektis lin membro de la Centra Estraro kaj prezidanto de la bulgara sekcio de IFEF. Samtempe li gvidis la ekonomian entreprenon de Sofia Distrikta Estraro „Esperanto“.

Dum kelkaj jaroj li fordonis siajn fortojn por la preparo de la 20-a Kongreso de IFEF en la somerrestaĵejo „Slancev Brjag“ (Suna Bordo) ĉe la Nigra Maro en 1984.

Ĉiuj kiuj konis lin, neniam forgesos lian modestecon kaj bonkorecon.

ENHAVO

II Esperanto kaj komputiloj

1 Monda jardeko por spirita renesanco (Dimităr Haĝiev)

3 La XI Generala Konferenco de MEM (Veneta Baleva)

4 Radio Sumen en Esperanto (Hristo Tonev)

6 Jaro de Grabowski

7 80 jaroj de UEA: Hektor Hodler — la fondinto (Hristo Iskrov)

8 Problemoj de la instruado: La metodo de Andreo Cseh (Doc. Georgi Dimov)

10 Lingvaj demandoj (Bernard Golden)

12 Niaj veteranoj: Talenta E-aganto kaj poeto (Georgi Iliev)

13 La delegita reto de UEA (Nikola Nikolov)

14 Ekskurseto tra mia rememormondo (Asen Josifov)

15 Aĉetu en la librovendejo de BEA!

16 100 tagojn en Bulgario (Dang Dinh Dam)

16 Kumeŭaŭa — la filo de la ĝangalo (Tibor Sekelj)

21 Leteroj de korespondamikoj (Lilia Koleva)

22 Originala verkaro: Bravulo (Stojan Vojčev)

24 Ni recenzas: Ora garbo (Hristo Gorov), „Tango“ en Esperanto (Georgi Miĥalkov)

26 Distroj

29 Poezio (Krasin Himirski, George Topirceanu)

29 Kie, kiam, kion

30 Enlanda movado

31 El nia leterkesto

IV Kanto de l' turisto (Toma Ajolov)

Sur la unua kovrilpaĝo: Boatoj.

Foto: Dimităr BOJAGIEV

Ĉefredaktoro: Maria JANKOVA

Redakta komitato: Atanas ILKOV (redaktoro);

Dimităr HAĜIEV; Georgi MIĤALKOV;

Krăstju KARUCIN; Kunčo VÁLEV, Liber-

taria MLADENOVA; Lidia RAEVA (respon-

deca sekretario); Mariana ELENOVA; Nikola

NIKOLOV; Radoslav PARAŠKEVOV doc.

Stojčo STOJČEV; Venelin MITEV.

Teknika aranĝo: Ljubomir LAZAROV

Korektisto: Jordan ĈALJOVSKI

Administranto: Nikola NIKOLOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Kiril kaj Metodij“ — I grado.

Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:
„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Hristo Botev 97

1303 Sofio, Bulgario

P. K. 66

1 000 Sofio

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

KANTO DE L'TURISTO

Turisto mi estas
kun ĝojo en kor',
potence min tiras
ekstero kaj for'.

Dum vintro, aŭtuno,
printempo, somer'
mi strebas al suno,
al freŝa aer'.

Sopiras mi iri
sur monta altaj'—
pejzaĝon admiri
al urb' kaj vilaĝ'.

Min ravas la bildoj
en vasta natur'—
de l'floroj la mildo
la blu' de l'lazur'.

De l'akvoj susuro
kaj kant' de l'birdar'—
jen mia plezuro
en monta arbar'.

Amikoj min logas
per ĝojo, humor'—
la floroj kaj drogoj
per fajna odor'.

Min nutras nur pura,
bongusta produkt'—
laktaĵo natura,
mielo kaj frukt'—

Min em' vagabonda
allogas al for'—
mi vagos la mondon
dum batos la kor'!...

Toma AJOLOV

Fotoj: Dimităr BOJAĜIEV

